E HUNGARA VIVO

2-48

F/330

MAGYAR KÖNYVTÁR SALGÓTARJÁN



1.

1969

UTASELLÁTÓ

certigas en siaj

STACIDOMAJ RESTORACIOJ

ankaŭ ĉi-jare
la manĝadon
de
TURISTAJ GRUPOJ
je
FAVORAJ PREZOJ

Vi povas elekti
el 32 specaj
menuoj
Vi povas mendi
el 7 specaj
provianto-pakaĵetoj

La mendon bonvolu sendi
plej malfrue sep tagojn antaŭ la dato de utiligo
al la sekva adreso:

UTASELLÁTÓ VÁLLALAT, ÜZEMELTETÉSI OSZTÁLY
SZAKFELÜGYELETI CSOPORT,
BUDAPEŜTO, V. VERES PÁLNÉ U. 24. (TELEFONO: 189—900, SUBSTACIO: 160)

Al turistaj grupoj laŭ deziro sendas presitan
manĝad-informaron, donas klarigojn per telefono

UTASELLÁTÓ
PASAĜERBUFEDO

HUNGARA VIVO

Kvarĵonjara revuo de la Hungara Esperanto-Asocio
Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.

☆

1969, IX-a jaro, 1-a numero

Mihály Gergely: Saluto al niaj legantoj 1
Valeria Szabó: Panoramo 2
István Örkény. *Tr. L. Tárkony* 5
Gasta Paĝo de *W. Auld* 7
Paŭlo Balkányi: Okazis antaŭ kvindek jaroj 8
Kálmán Mikszáth; La ĉevalo, la šafideto kaj la leporo 10
Originala Esperanto-Poezio de *A. Ponori Thewrewk* 11
Portreto pri filmreĝisoro *A. Kovács, Tr. L. Kökény* 12
I. Szerdahelyi: Metodo kaj metodoj 14
T. Völgyi: Recenzo pri „Fabeloj" de *J. Dorosmai.* 15
F. Juhász: Konfeso pri la grafika arto de *J. Kass, Tr. T. Ujlaky-Nagy* 15
J. D. Mondfama hungara fabriko: MOM. *Tr. L. Kökény* 18
F. Jáki: Recenzo pri Turisma Vortaro de *A. Pechan* 19
I. Bácskai: Leĝo pri la nova hungara trafikpolitiko 20
L. Benjámin: Du jardekoj. *Tr. K. Kalocsay* 22
L. Lesznai: Budapeštaj Muzikaj Semajnoj 1968 23
Sz. Bálint: La petolema telefono 24
Korespondi deziras. — Leterkesto 26
É. Farkas: Kreskanta nombro — pliiĝantaj araĝajoj 29
I. Szenes: Nia humuro 30
El lâ 2-a numero de Hungara Vivo 31
Glosaro 31

La frontpaĝo kaj sur ĝi la grafikaĵo: Kapo de Mozeo — laboro de János Kass

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro: *d-ro Jozefo Mátéffy*
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
d-ro Pál Avar, d-ro István Bácskai, Szilárd Bálint, Imre Botos, Ervin Fenyvesi, Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, Valeria Szabó, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Ujlaky-Nagy

Ĉefkunlaborantoj:
D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi, Károly Jobbágy, Kolomano Kalocsay, Mór Korach, Ludoviko Kökény, Sándor Szathmári, Lajos Tárkony

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest, VII., Rákóczi út 54. Telefono: 224—819

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro Disvastigas la Hungara Pošto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj en la Centra Gazetoficejo de la Pošto) K. H. I., Budapest, V. József nádor tér 1.) senpere, aŭ per čekenpagilo, por individuaj abonantoj la čeknumero estas 61 280, por neindividuaj 61 066.

La abono estas por jaro Ft 32.-. al eksterlando krome Ft 6.-40 poŝtelspezo.

69.66848 Akadémiai Nyomda, Budapest
Responda gvidanto: György Bernát
Indexszám: 25377

Saluto al niaj legantoj

Per la nuna numero komencas Hungara Vivo la naŭan jarkolekton. En la vivo de revuoj ĉi tio estas ĉiam respektinda rezulto — precipe, en la Esperanto-movado, kiu devas batali ankoraŭ hodiaŭ kontraŭ nombraj malhelpaĵoj. Dum tiuj ok jaroj nia revuo klopodis — laŭ siaj eblecoj — doni aŭtentikan bildon pri Hungario, pri la Esperanto-vivo en nia lando, kaj pere de altnivelaj tradukaĵoj kaj originalaj verkoj riĉigis la internacian trezoron de la Esperanta literaturo. Ni kredas, ke ne estas fanfarono tiu ĉi konvinkiĝo: pro la ĝisnuna laboro Hungara Vivo troviĝas inter la plej altnivelaj Esperanto-organoj de la mondo.

La šanĝo en la redaktado kaj tipografio de HV motivas, ke ni parolu al niaj karaj legantoj pri la nova karaktero de la revuo. Antaŭ ĉio, ni certigos, ke la ĝisnuna rezulto de HV estu daŭrigota, komune kun la ankaŭ hodiaŭ validaj tradicioj de la malnova, granda modelo: Literatura Mondo. *Krom tio ni dezirus modernigi la revuon pere de la varia enhavo laŭ la pretendoj kaj deziroj de la moderna homo.*

La ideo kaj sukcesoj de Esperanto en Hungario — ĉefe de post la 51. UK en Budapešto — logis multajn homojn en niajn vicojn. Inter ili troviĝas multnombre ankaŭ ĵurnalistoj, verkistoj, aktoroj, scienculoj. Do, estas evidente, ke ni fortigu la redaktadon de Hungara Vivo per ili, kunlaborante — kompreneble — kun la malnovaj, spertaj redaktoroj kaj kunlaborantoj.

Laŭ nia opinio, por la nuntempa homo, kiu — ĉie en la mondo — estas partoprenanto de la epokaj eventoj kaj problemoj, devas esti interese, kiamaniere reflektiĝas en la verkoj de hungaraj scienculoj kaj aktoroj la ĉiutagaj aŭ sortformantaj eventoj de la nuntempo. Pro tio, ni donas allogan gustumaĵon jam en la nuna numero el la diversaj artoj. Ni prezentas la skribarton de Stefano Örkény *kaj Ladislao* Benjámin, *kaj el la artkreaĵoj de grafikisto Johano* Kass.

Ni intencas sisteme konatigi eminentulojn de la eŭroparanga hungara grafikarto, kaj ankaŭ de aliaj belartoj, kies verkoj interese kaj reale spegulas la vivon en Hungario. Ni dezirus atingi, ke niaj legantoj „vidu" la elstarajn produktaĵojn de nia filmarto kaj la plej sukcesajn teatraĵojn, krom tio ili estu partoprenantoj ankaŭ en la muzika vivo. Pro tio ni regule konigos la novaĵojn el nia kultura vivo.

Kompreneble, en Hungario estas ankaŭ vigla ekonomia, scienca, teknika kaj komerca vivo, do, ni raportos ĉiam pri la plej freŝaj, gravaj problemoj kaj rezultoj el tiuj sferoj.

*Ni ne forgesos la novajn produktaĵojn de la originala Esperanto-literaturo, ĉefe el Hungario, eĉ apogi ĝin estos nia šatata tasko, sed ni donos eblecon por aperigi sur la „*Gasta paĝo*" poemojn de eksterlandaj eminentaj verkistoj, kiel ekzemple nun nia kara gasto estas: William* Auld.

Ni esperas, ke la malnovaj legantoj de Hungara Vivo restos senšanĝe fidelaj amikoj ankaŭ en la estonto, kaj volonte akceptos nian klopodon por la plibonigo de la revuo, kaj ankaŭ ni volonte akceptus proponojn kaj instigojn de la legantoj — por ke la redaktoraro povu transdoni modernan revuon laŭ la pretendoj. Precipe ni kalkulas je la apogo en la disvastigado de nia revuo, ĉefe inter la junaj esperantistoj, kiujn ni ĝoje salutus kiel novajn abonantojn de Hungara Vivo.

Ni ne sekretas tiun ambicion, ke ni šatus esti tia revuo, kies aperigon la abonantoj atendos scivoleme, ĉar indas paroli eĉ diskuti pri ĝiaj artikoloj, — kaj ĉiuj legantoj trovas en ĝi por si mem interesan kaj amuzan legaĵon: pri Hungario — en Esperanto.

MIHÁLY GERGELY

Ahti Karjalainen

ministro pri la eksteraj aferoj de Suomio vizitis Hungarion dum la pasinta oktobro. Inter la du landoj estas delonge tradicia bona interrilato, ĉefe en kulturaj aferoj, pere de tiu ĉi vizito kaj oficialaj traktadoj komenciĝas ankaŭ vigla ekonomia kooperado. S-ro Karjalainen kun laŭdo deklaris ankaŭ pri nia belega ĉefurbo. La bildo montras, kiam li kun la hungara ministro pri la eksteraj aferoj, Johano Péter promenadis en la malnova interna urbo de Budapeŝto.

Hungaraj scienculoj

faris veturadon per aŭtomobilo en la granda regiono de Volgo, inter la parencaj popoloj de la hungaroj: mordvina, ĉeremisa, votjaka. Ladislao Vikár, popolmuzik-esploristo, kaj Gábor Bereczky, finn-ugra lingvisto kune vojaĝis dum ses semajnoj, 2000 kilometrojn, en la vilaĝoj de mordvinoj, ĉuvaŝoj, ĉeremisoj, tataroj kaj votjakoj — ili kolektis pli ol 500 popolkantojn, muzikan kaj lingvan materialon, eĉ ili filmis popoldancojn. Kun la pli frua materialo ili jam havas sufiĉe trarigardeblan bildon pri la popolmuziko de la regiono de Volgo, kaj la scienculoj nun komencas kompari ĝin kun la hungara popolmuziko. Interese estas, ke ĉe la tataroj — kiuj ne estas parencoj de la hungaroj, sed en la tempo de popolmigrado la du popoloj estis en proksima interrilato — la scienculoj ankoraŭ hodiaŭ trovas en la tatara popolmuziko hungaran melodion.

Esperanto Foto-Ekspozicio en Vieno

PANORAMO

Dum 12 tagoj pli ol 100 artkvalitaj fotobildoj kun esperantlingva klariga teksto montris por la publiko en la Viena Hungara Kolegio la plej belajn pejzaĝojn, art- kaj historiajn memoraĵojn, variajn sektorojn de la vivo de Hungarlando. Celo de la prezentado — destinita fariĝi migranta ekspozicio — estas helpe de Esperanto kontribui por la evoluigo de la sincere amikaj interrilatoj, kaj pere de tio akceli la pacan kunekzistadon de la diverslingvaj popoloj.

La fotomaterialon elsendis ŝtata organizaĵo: Instituto por Kulturaj Interrilatoj en Budapeŝto. Ĉe la solena inaŭguro kiel speciala sendito, vicprezidanto de Hungara Esperanto-Asocio reprezentis ambaŭ organizaĵojn. La invititaj gastoj plenŝtopintaj la modernan ekspozician halon povis ĝui ankaŭ belegajn amatorajn koloran filmon kaj diapozitivojn pri la 51-a UK en Budapeŝto, kaj pri la Somera Esperanto Universitato en Gyula.

Elkoran dankon meritas la aŭstraj samideanoj, kiuj sub gvidado de la prezidanto de Aŭstra Esperanto-Ligo s-ro dro Leopold Grimme kaj vicprezidanto s-ro Hugo Kraus tre ageme helpis nin, simile ĉe la preso s-ro redaktoro dro Franz Scheibenreiter kaj ĉe la Viena Radio s-ro Emil Vokal.

Ĉe la mikrofono

de la esperantlingva dissendo de Radio Budapest blonda junulo sidis antaŭ nelonge. Ne kiel turisto li vizitis nian ĉefurbon — li venis el Svislando por labori ĉi tie en la komisio de sia fabriko apud Locarno.

La juna svisa esperantisto *Hans Swyss*, malĝoje konstatis, ke Esperanto ankoraŭ ne disvastiĝis tiel, ke ĝi povus servi, kiel interkomprenilo sur la tereno de la tekniko. Nome li akompanas specialajn maŝinojn, produktaĵojn de sia fabriko, kaj li klarigas al la eksterlandaj laboristoj la uzadon de ĉi tiuj maŝinoj. En ĉi tiu laboro, kompreneble, li ofte spertas lingvajn malfacilaĵojn. Tamen kun ĝojo li jam povis raporti pri restado en Pollando kaj en Nederlando, kie li havis la okazon utiligi Esperanton. Kvankam li kun tre malmultaj kolegoj povis lingve komprenigi sin, li tamen varme interamikiĝis kun laboristaj kolegoj en la fabriko de „Csepel Autógyár" en Szigethalom. Eĉ li petis de Budapeŝtaj esperantistoj hungarlingvan propagando-materialon pri Esperanto por disdoni tie kaj per tio instigi la kolegojn lerni Esperanton. Volonte li denove, kiel turisto planas viziti Hungarion, esperante, ke tiutempe jam ankaŭ kun la nunaj kolegoj ili facile povos konversacii Esperante.



PANORAMO

En la olimpio de Meksiko

la hungaraj sportistoj atingis la kvaran lokon el la partoprenantaj landoj. La eminentaj hungaraj sportistoj gajnis 10 orajn, 10 arĝentajn kaj 12 bronzajn medalojn. Hejmenveninte, ili estis ĉirkaŭataj de entuziasmo jare de la zelotoj kaj la tuta hungara socio estis kontenta. La hungara ŝtato mem premiis la bonegajn rezultojn. La unuaj, duaj kaj triaj klasitoj, krome la plej eminentaj sportgvidantoj kaj trejnistoj ricevis ŝtatajn distingaĵojn.

En West Side de clevelanda

festis la 60-jaran ekzistadon la hungara laborista-ĥoro. En 1908 fondiĝis tiu ĉi ĥoro en Cleveland, kaj ekde tiam ĝi havas gravan rolon en la tiea kultura vivo inter la hungaroj. Ankaŭ la ,,malnova patrujo'' sendis saluton elkore al la jubileanta ĥoro, en kiu troviĝas ankoraŭ kelkaj veteranoj el la iamaj fondintoj — la 90-jara Jozefo Sós, la 87-jara Áron Kapcso, kaj la 84-jara Bertalan Heinrich, kiuj ankoraŭ hodiaŭ partoprenas aktive en la prezentado de la ĥoro. HV sendas apartan saluton — pere de tiu ĉi paĝo — al niaj karaj fratoj en la fora Ameriko. Pluajn sukcesojn !

Paprikon

pretigas oni en la regiono de Szeged por la jaro 1969 — 500 vagonojn pli multe ol lastjare. Tiu ĉi kvanto estas bezonata por la pliproduktado de salamo, perkelto kaj fiŝsupo, kiujn tre ekŝatis la eksterlandaj turistoj en Hungario. Do, estu trankvilaj karaj gastoj, paprikon vi trovos sufiĉan en la bongustaj manĝaĵoj !

Internacia tradukista konferenco

okazis en Budapeŝto por la eksterlandaj tradukistoj de la hungara literaturo. Partoprenis ĝin, kiel gasto de la Asocio de la Hungaraj Verkistoj, inter aliaj *Jozefo Velebit* el Jugoslavio.

Li tradukas el multaj lingvoj en la kroatan, plej ofte el la hungara lingvo, kaj li estas konata ankaŭ en Esperantujo kiel poeto kaj tradukisto. Granda surprizo estis en la konferenco, ke s-ro Velebit parolis Esperante pri la Budapeŝta skolo, pri Literatura Mondo, kaj kompreneble pri la hungaraj Esperanto-tradukistoj, kies fama reprezentanto estas d-ro Kolomano Kalocsay. Per tiu alparolo li multe helpis al la E-tradukista grupo de la Asocio de la Hungaraj Verkistoj por realigi ilian planon: por atingi pli multan rekonon de la E-literaturo en la hungara literatura vivo, ankaŭ oficiale. En la nomo de HV-redaktoraro ni ankaŭ aparte dankas al s-ro Velebit la gravan alparolon.



Drujba

nomiĝas tiu duonkondukila, mikroonda, kvarkanala, aŭtomata retarsistemo, kiun komune projektis la esplora instituto de la soveta poŝto en Moskvo kaj la hungara Telekomunika Esplorinstituto (Távközlési Kutató Intézet) en Budapeŝto. La seria produkto okazas en Hungario, kaj la aĉetanto estos ĉefe Sovetunio. La unua preta kompleksо de Druĵba — konsistanta el ses stacioj — jam ,,laboras'' en Sovetunio; ĝi estas taŭga por perado de ĉ. 11 000 telefonparoloj samtempaj, ĝi peradas al granda distanco koloran kaj nigran-blankan televidprogramojn.

Hungara partopreno en la Fiat-programo ĉe Volga

En Sovetunio, ĉe la riverego Volgo estiĝas la granda aŭtofabriko, en kiu estos produktata la VAZ-21.01 tipa aŭtomobilo, laŭ la Fiat-124. En tiu kooperativa produkto partoprenos ankaŭ la hungaraj fabrikoj, kun diversaj elementoj. Ekz.: elektrajn ekipaĵojn, instrumentojn, aŭtoradiojn, serurojn, klinkojn, reflektoro-ampolojn, ktp. produktaĵojn sendos ili en la jaroj 1969—75. Karakterizas tiun kooperadon, ke la hungaraj fabrikoj, ekde 1972 provizos per tiuj aŭto-elementoj ĉiu jare 300 000 aŭtomobilojn — do, en ĉiu dua aŭtomobilo, kiu forlasos la grandan fabrikon ĉe Volgo, troviĝos elemento produktita en Hungario. La kontraŭvaloro estos po jare 12 000 aŭtomobiloj por la hungaroj.

Bonvolu spekti la il-maŝinojn, la kablomaŝinojn, la maŝinojn por la industrio de telekomunikad-tekniko, por la industrio de artmaterialoj kaj por la ŝu-industrio, ekspozotaj fare de la Hungara Maŝinindustria Eksterakomerca Entrepreno „Technoimpex" en la sube vicigitaj internaciaj foiroj kaj ekspozicioj:

„Stankoindustri 69" Moskvo	**20-28. 1. 1969.**
Lejpciga Internacia Foiro	**2-11. 3. 1969.**
Milana Internacia Foiro	**14-25. 4. 1969.**
Budapeŝta Internacia Foiro	**16-26. 5. 1969.**
Poznana Internacia Foiro	**8.17. 6. 1969.**
Damaska Internacia Foiro	**25. 8.-20.9. 1969.**
Izmira Internacia Foiro	**20. 8.-20.9. 1969.**
Brna Internacia Foiro	**7-16. 9. 1969.**
Viena Internacia Foiro	**7-14. 9. 1969.**
Salonika Internacia Foiro	**7-28. 9. 1969.**
Zagreba Internacia Foiro	**11-21. 9. 1969.**
Sidnea Internacia Foiro	**16-25. 10. 1969.**
Limaa Internacia Foiro	**17-31. 11. 1969.**

HUNGARA MAŜININDUSTRIA EKSTERAKOMERCA ENTREPRENO

»TECHNOIMPEX«

Budapest V., Dorottya utca 6. Budapest 62 Postafiók 183
Telegrafa adreso: Technoimpex



István Örkény

Lia konfeso al sia libro aperinta en 1966

Pasis mia kvindeka jaro, tamen ankoraŭ mi vivas mian aĝon de eksperimentado. Mi scias, ke tio ne estas sana stato. Alia homo faras tiel, ke june li ĉirkaŭiras sian parcelon el la mondo kaj serĉas la formon, kiu al li konvenas, sian stilon. De tiam li skribas tiamaniere: bonan, malbonan, ĉefverkon, kiu, kiam, kiel. Oni diras: li trovis sin mem. Kial mi ne trovis min mem, tion mi eĉ ne konjektas. Eble mi nur ne volis trovi.

Ankaŭ mi scias ja, ke ĉiun temon almenaŭ cent aŭtoroj jam verkis antaŭ mi. Tamen, ĉiu fenomeno, tuj kiam ĝi elpaŝas el nova historia medio, surprenas novan vizaĝon. La hirundo same flugas de jarmiloj, nur ni ĝin postrigardas ĉiam alimaniere: ĝia flugo vekas aliajn ideojn nun ol antaŭ dek aŭ cent jaroj.

Tiu ĉi malgranda diferenco renaskas ankaŭ eluzitan temon, tiom, ke ĝin mi eĉ ne kuraĝas tuŝi per elprovitaj verkistaj iloj. Miaj hieraŭaj iloj por hodiaŭ jam malnoviĝis, kio estas bona hodiaŭ, morgaŭ jam ne estos tia.

Vane mi devenas el „intelektula" familio, ĉe ni oni ne tro estimis la literaturon. La verkistoj plie nur pruntepeti venis al mia patro, kiu tiel timis pri mi pro tiu ĉi futuro, ke por kontentigi lian animan pacon mi devis akiri ne unu sed du diplomojn. Miajn unuajn skribaĵojn Attila József publikigis en „Szép Szó" (Bela Vorto). Kun nekredebla pacienco li okupiĝis ankaŭ pri miaj plej malbonaj noveloj, ĝis hodiaŭ min feliĉigas, ke li estis la unua „redaktoro", kun kiu mi havis aferon. „Se vi volas, ke fariĝu io el vi, — li admonis min ŝerce, — restu ĉiam en vivproksimo."

Se nur tio necesas por verkisteco, mi devas esti tre granda verkisto. Koncerne materialon de travivaĵoj la sorto ne traktis min malavare. De antaŭ la faŝismo mi travagabondis la duonon de la mondo, en ĉiu dua semajno mi plenumis alian profesion, apenaŭ mi hejmenvenis, oni portis min al la fronto. Post la disfalo ĉe Voronjeĵ, dum kvar kaj duono de jaroj mi estis en militkaptiteco, kaj kiam fine mi venis hejmen kun la manuskripto de kvar libroj en mia soldatkesto, preskaŭ mi malĝojis, kiaj trankvilaj jaroj venos de nun. Mia antaŭsento ne efektiviĝis.

Mi ne scias, al kiu mi dediĉu mian libron. Ĉu al la virinoj? Ĉu al la viroj? Ĉu al junuloj, bonedormantoj aŭ nokte-vagantoj? Bedaŭrinde, ne estas vere, ke la verkisto skribas por ĉiu. Sed kiuj tiun ĉi epokon travivis kun mi, kun tiuj ankoraŭ longe estos komuna mia signalsistemo. Kiom el ĝi komprenos la homoj post ni venontaj, mi ne scias.

Uz-instrukcio al la "Unuminutaj noveloj"

La aldonitaj noveloj, spite al sia kurteco, estas plenvaloraj verkaĵoj. Ilia avantaĝo estas, ke per ili oni ŝparas tempon, ĉar ili ne pretendas atenton daŭrantan dum longaj semajnoj, monatoj.

Ĝis la duonkuirita ovo kuiriĝos, ĝis la vokita telefonnumero (se ĝi signas okupitecon) sin anoncos, ni legu unu Unuminutan Novelon.

Ankaŭ malbona ĝenerala farto, ĝenata nervostato ne estas malhelpo. Ni povas ilin legi sidante aŭ starante, en vento kaj pluvo, aŭ komunikiĝante en plenŝtopita aŭtobuso. Plej multaj el ili estas ĝueblaj ankaŭ dum irado!

Estas grave, ke ni atentu pri la titoloj. La aŭtoro klopodis je kurteco, do li ne povis doni nenidirajn titolojn. Antaŭ ol ni ascendas tramon, ni rigardas ĝian numeron. Same grava apartenaĵo de tiuj ĉi noveloj estas ilia titolo.

Kompreneble tio ne signifas, ke estas sufiĉe legi nur la epigrafojn. Unue la titolo, poste la teksto: jen la sole ĝusta uzmaniero.

Atenton!

Kiu ion ne komprenas, tiu legu denove la duban skribaĵon. Se ankaŭ tiel li ne komprenas, la manko estas en la novelo.

Ne ekzistas malsaĝaj homoj, nur malbonaj Unuminutaĵoj!

Informado

De dekkvar jaroj li sidas ĉe la pordenirejo, antaŭ malgranda ŝovofenestro. Nur duspecajn demandojn oni faras al li.

— Kie estas la kontoroj de Montex?

Je tio li respondas tiel:

— Sur la unua etaĝo, maldekstre.

La dua demando estas la jena:

— Kie estas trovebla la Kaŭčukprilaborejo?

Je kio li respondas tiel:

— Dua etaĝo, dekstre, dua pordo.

De dekkvar jaroj li ankoraŭ neniam eraris, ĉiu ricevis la necesan informadon. Nur unufoje okazis, ke ĉe lia fenestro ekstaris damo, kaj faris unu el la kutimaj demandoj:

— Mi petas, kie estas Montex?

Je tio escepte li rigardis en la foron, poste li diris:

— Ni ĉiuj venas el la nenio kaj reiras al la granda stinka* nenio.

La damo faris plendon. La plendon oni priekzamenis, pridiskutis, poste oni ĝin nuligis.

Vere, ne estas tiel grava evento.

* malbonodoraĉa.

Trilo

Ŝi eltordas la paperon el la skribmaŝino. Ŝi prenas novajn foliojn. Ŝi metas inter ilin la karbopaperon. Ŝi skribas.

Ŝi eltordas la paperon el la skribmaŝino. Ŝi prenas novajn foliojn. Ŝi metas inter ilin la karbopaperon. Ŝi skribas.

Ŝi eltordas la paperon el la skribmaŝino. Ŝi prenas novajn foliojn. Ŝi metas inter ilin la karbopaperon. Ŝi skribas.

Ŝi eltordas la paperon. De dudek jaroj ŝi estas ĉe la entrepreno. Ŝi tagmanĝas malvarman manĝaĵon. Ŝi loĝas sola.

Ŝi nomiĝas sinjorino Wolf. Ni notu: Sinjorino Wolf. Sinjorino Wolf. Sinjorino Wolf.

Klimakso

La dommastro rimarkis la gasodoron. Li rompis la pordon. La adiaŭletero kuŝis sur la ŝtonplanko de la kuirejo, sur ĝi estis ceramika cindrujo, en ĝi estis la stumpo de la lasta cigaredo.

„Hodiaŭ estas mia kvindek-kvara naskiĝtago — legis la dommastro.

— En la domo neniu min amas. La Komunuma Dom-administrejo ne emas reordigi la plafonon, kiu likas. Mi volas morti. Vidvino de Mihály Berger."

La cigaredstumpo estis lipfarba.



La senco de la vivo

Se multan ĉerizoforman kapsikon ni plektas je ŝnuro, el tio fariĝas kapsikokrono.

Sed se ni ne plektas ilin, ne fariĝas krono el ili.

Kvankam la kapsiko estas samkvanta, same ruĝa, same akra. Tamen ĝi ne estas krono.

Nur la ŝnuro farus tion? Ne la ŝnuro faras tion. Tiu ŝnuro, kiel ni scias, estas io akcesora, io triaranga.

Kio do?

Kiu tion pripensas kaj priatentas, ke liaj pensoj ne vagabondu konfuze, sed ili iru en la ĝusta direkto, tiu povas malkovri grandajn verojn.

Italio

La itala dirigento, post kiam li ĝis fino dirigentis la Maskobalon, ekiris viziti la Budapeŝtan nokton. Ĉe mateniĝo li invitis al sia tablo damon, kun kiu jam plurfoje li dancis.

La gastoartisto — per interveno de la interpretisto — iom da tempo amindumadis, poste metis la manon en la poŝon, prenis sian monujon, kaj metinte la polmon sur ĝin, atendoplene li rigardis la interpretiston.

Tiu parolis kelkajn vortojn kun la damo.

— Cinquecento, — poste li diris al la dirigento.

— Trecento — diris la gasto, ĉar li trovis la sumon alta.

— Quattrocento — proponis fine la interpretisto.

Ili interkonsentis pri ĝi.

La Mesio

Estis la deka horo antaŭtagmeze, kiam la verkisto finis sian novan dramon. Vespere restis ankoraŭ du malfacilaj scenoj. Li traverkis la nokton. Dume almenaŭ dek nigrajn kafojn li kuiris por si kaj almenaŭ dek kilometrojn piediris en la strikta hotelĉambro tien-reen. Tamen nun li sentis sin tiel freŝa, kvazaŭ li ne havus korpon, tiel feliĉa li estis, kvazaŭ la vivo estus beliĝinta, kaj sentis sin tiel libera, kvazaŭ la mondo ĉesus ekzisti.

Li kuiris ankoraŭ unu nigran kafon. Li promenis al la bordo. Li serĉis la boatiston.

— Ĉu vi portus min iom sur la akvon, oĉjo Volentik? — li demandis.

— Bonvolu ensidiĝi — diris la boatisto.

La ĉielo estis nubkovrita, sed vento ne moviĝis. Kiel grandega glimvitra plato, tiel glata kaj griza kaj brila estis la lago. Oĉjo Volentik remis per rapidaj sed kurtaj frapoj, kiel estas kutime sur Balatono.

— Kion vi pensas? — demandis la verkisto, kiam ili jam faris sufiĉe grandan kvanton de vojo. — Ĉu oni vidas ĉi tien el la bordo?

— Jes, ankoraŭ — diris la boatisto.

Ili iris plu. La ruĝan tegoltegmenton de la refreŝiĝejo lante jam kovris la arboj. El la bordo vidiĝis nur ties verdo, el la vagonaro vidiĝis nur ties fumo.

— Eĉ nun? — demandis la verkisto.

— Eĉ nun — diris la boatisto.

Aŭdiĝis nur la plaŭdo de la remiloj; de la bordo jam ne atingis tien sono. Kunfandiĝis la domoj, la havenoj kaj la arbaroj. Vidiĝis jam nur unu krajonstreko, kie finiĝas la lago.

— Ĉu eĉ nun oni vidas ĉi tien? — demandis la verkisto.

La boatisto ĉirkaŭrigardis.

— Oni jam ne vidas ĉi tien.

La verkisto defrapis de siaj piedoj la sandalojn kaj ekstaris.

— Nu, entiru do la remilon, oĉjo Volentik — li diris. — Mi provas iom marŝi sur la akvo.



In Memoriam Dr. K.H.G.

— Ĉu Hölderlin estas al vi nekonata? — demandis germane doktoro K. H. G., dum li fosis por la ĉevalkadavro la fosaĵon.

— Kiu li estis? — demandis la germana gardisto.

— Tiu, kiu verkis „Hyperion" — klarigis doktoro K. H. G. Li tre ŝatis klarigi. — La plej granda figuro de la germana romantiko. Kaj ekzemple Heine?

— Kiuj estas ili? — demandis la gardisto.

— Poetoj — diris doktoro K. H. G.

— Ankaŭ la nomon de Schiller vi ne konas?

— Sed mi konas ĝin — diris la germana gardisto.

— Kaj Rilke?

— Ankaŭ lin — diris la germana gardisto, kaj fariĝis paprikruĝa, kaj mortpafis doktoron K. H. G.

Tradukis L. Tárkony

GASTA PAĜO

WILLIAM AULD*

LA PASINTECO NE EKZISTAS...

La pasinteco ne ekzistas:
kaj tamen ofte en la nuno
ni spiras pensojn de l'aŭtuno
kaj pro l'printempo tristas.

Se nur, se nur . . . Ja ne valoras
sopiri, kio jam ne eblas,
stultul' bedaŭras kaj funebras,
al idiot' doloras

pasintaj pekoj kaj eraroj,
ĉar nur la hodiaŭ' realas . . .
Okulojn miajn larm' vualas
kaj arĝentiĝas miaj haroj.

NOVEMBRA SPLENO

Griza mateno blovas sur siajn manojn.
Dormemaj aŭtoj rampas tra la vilaĝo.
Per skarpo malpura volvas vintra pejzaĝo
sian vizaĝon, kaj kraĉas sur ĉies planojn.

Arboskeletoj pingliĝis al la friso ĉiela;
en la ĝardeno klerika merlo promenas
kun manoj subbasken ŝovitaj. Sin dispremas
kontraŭ fenestron mia sopiro degela.

Glaciepoko alrampas; baldaŭ nin ĉasos
uroj tra blanka dezerto de neĝaj dunoj;
sub la malvarma feblo de distaj sunoj
ni trolojn timos kaj klanojn najbarajn frakasos.

LA GARDANTOJ

La okra lum' nervoze trafenestras,
malcerta pri l'akcepto renkontota.
Navigas mi, en barko senpilota,
pensmaron, kaj albatrojn arbalestas.

En mia Rom' la citadelon gardas
anseroj stultaj, kiuj alarmadas
eĉ dum la tag', se civitan' paradas,
se honestul' marĉandas aŭ lombardas,

se ridas geamantoj, sacerdotoj
disputas gravmiene, se ekŝtormas
(sed nokte tiuj damnaj birdoj dormas,
dum miajn murojn grimpas jam la gotoj).

MIA FILINO DEKTRIJARA

Tritika kampo. Suna or'.
Aero diamante pura.
Cervino rande de arbar'
snufetas, delikatstatura.

Septuba flut' de Lordo Pan
eksonas flustre, malproksime.
Sur sojlo de paŝtistkaban'
hundeto dormas. Rev-esprime

la libron ŝi ne legas plu,
formikon ĉasas herberlance;
kaj tra l'kampar'por randevu'
la estontec' alvagas dance.

KOŜMARO

Mi iris laŭ la urba strato
(en mia sonĝ' matena);
trankvila ŝajnis animstato,
la etoso: senĉagrena.

Subita ploro min traŝutis
(mi petas, psikiatro?),
ĉar preterpase min salutis
mia mortinta patro.

* El novaj poemoj de la aŭtoro.

Okazis antaŭ kvindek jaroj

◀ *Proklamo de la respubliko (16. nov. 1918.)*

Jam kvindek jaroj?!

„Sinjoro Subkolonelo, mi humile prezentas min je servo ĉe la garnizono!" — tiel mi anoncis min en bela aŭgusta tago antaŭ la timiga garnizonestro, subkolonelo Hölzl. Li estis jam pensiulo en Graz, kiam en la lasta jaro de la unua mondmilito la supera militkomando sendis lin al la tiutempa Sudhungarlanda, tipa provinca urbo Zombor por esti la militstacia estro.

Mi estis — post kvarjara militservo — jam ĉefleŭtenanto en rezervo kaj havis jam kelkajn militdekoraciojn. Eble tiuj dekoracioj simpatiigis min ĉe la severa subkolonelo, kiu esence ne estis malbona homo, sed facile nervoziĝis kaj povis terure blasfemi, kriegi, riproĉi la subulojn, do kelkfoje ankaŭ min. Tamen li havis ankaŭ bonan flankon, nome li trovis min simpatia, ekamis min kaj tuj nomis min anstataŭanto de la stacio-oficiro kaj krome „dekoracia referanto". Ĉi lasta estis unika posteno en la armeo, eble rekte kreita por mi!

En oktobro mi jam daŭrigis mian milittaglibron, en kiu mi skribis pri espero de alvenonta paco. „Bulgario subite petis armisticon. Germanio ŝajne jam ne povos reteni la amerikajn trupojn, kaj akceptos ĉiun kondiĉon. Kiel ĝojegas nun milionoj pro tiu malvenko! Oni ne zorgas pri la honto, eĉ pri tio ne, kiu estos reganto, nur estu paco sen mortigo, — benita paco!"

Ja, pli frue, en 1914 mi skribis: „se ni ne havos komunan rapidan venkon, ni havos malagrablan finon." — Hazardo, ke mi divenis tion!

Kaj tiam vere alproksimiĝis la katastrofo kaj la revolucio. Mi notis pri la bolŝevikaj sciigoj el Sovetunio: „Eble tio alportos sanon"? ... „Novaj, freŝaj ventoj blovas!"

Ankaŭ min kaptis poste la novaj ideoj. Ja multaj esperantistoj vidis tiam grandajn eblecojn por plivastigo kaj utiligo de Lingvo Internacia. — Sed venis la timigaj sciigoj: „la serba armeo proksimiĝas al Beograd. Kroataj trupoj atakis proksimajn teritoriojn." La hungara soldataro ĉie retiriĝas, eĉ el nia garnizono multaj simplaj soldatoj malaperis.

Venis la 31-a de oktobro. Venis sciigoj pri la „burĝa" revolucio en la ĉefurbo Budapeŝto, kiun apogis ĉefe laboristoj kaj soldatoj ... Kaj en Zombor? Ne estis jam rekta kontakto kun la centro, nur novaĵoj venis kaj kelkaj gazetsciigoj: „Memstara Hungarlando! Memstara armeo hungara! Armistico!" La maldekstraj partioj en Zombor anoncis por la sekvonta tago fondon de „Nacia Konsilantaro", — la flagornamon de la urbo, kaj alvokis starigi memstaran armeon, ktp.

La subkolonelo, burokrata aŭstra oficiro, vespere komunikis al la oficiraro: Li ricevis nenian ordonon, li ne aŭskultas onidirojn, gazetsciigojn, li ne permesas apartigi la aŭstrajn oficirojn de la hungaraj, li forte kaj severe kontraŭstaros ĉian memstarigan movadon en la urbo.

Ni estis konsternitaj. Kion fari? Kia sangverŝado estos alitage, se la militistaro kontraŭagos? Kion faros la serbaj loĝantoj de la urbo? Kion faru la oficiroj favore sentimentaj por hungaroj? Kiel reagos la ceteraj simplaj soldatoj?

Vespere mi havis deĵoron kiel stacio-oficiro en la ĉepordega deĵorĉambreto de la kazerno. Subite kaptis min ideo kvazaŭ „supera instigo"! Mi provis la neeblan. Ni ne havis de tagoj telefonkontakton kun la ĉefurbo, ne venis la vagonaroj laŭ la horaro, la fervojhaltejon trapasis nur vagonaroj direktitaj perforte de la revenantaj frontsoldatoj.

Sed el la deĵorĉambreto mi provis alvoki telefone la proksiman urbon *Szabadka*. Mi petis oficiale rektan kontakton kun la militministerio en Budapeŝto. Kaj jen, okazis miraklo: la kunligo realiĝis. Anoncis sin tie certa kapitano Dienstl. Mi ne sciis, kio estas lia posteno kaj rajto. Sed mi klarigis al li la situacion kaj diris, ke savo estus nur se ni ricevus oficialan ordonon de la Budapeŝta centro al nia subkolonelo. Li tuj konsentis kaj ĉe la aparato ni kune konceptis telegramtekston laŭ kiu la ministerio oficiale sciigas la Zomboran garnizonkomandejon, ke fondiĝis la memstara hungara armeo. Ministroprezidanto fariĝis grafo *Károlyi*. Plej supera ordono: oni forigu de la soldatĉapoj la butonon kun la komencliteroj de la

imperiestro-reĝo, metu sur ĝin trikoloran rubandon, kaj — escepte la aŭstrajn oficirojn — la garnizono devos sekvan tagon ĵuri al la hungara armeo. Mi aldonigis ruze, ke subkolonelo Hölzl ĝis plua ordono restu la estro kaj respondecas pri la ordo kaj disciplino. Tuj plenumota ! Laŭ komisio de Budapeŝta militkomandanto subgeneralo Hunke telefonis kapitano Dienstl. Jen la resuma enhavo !

Lasante ĉion al mia anstataŭanto mi tuj kuris en la urbon. Mi eniris la kafejon en la ĉefplaca hotelo, kie kutimis kunesti vespere la oficiroj kaj aliaj urbanoj. Tie regis ekscita atmosfero, kiu eĉ kreskis, kiam mi eniris kaj deklaris: ,,Militordono telefona el Budapeŝto.''

Mi laŭtlegis ĝin en la granda silento.

Oni tuj decidis, ke kelkaj oficiroj, kiujn la subkolonelo bone konas kaj simpatias, — kompreneble kun mi, — vizitu lin en lia proksima loĝejo. Estis kutima teretaĝa domo. Ni vekigis lin. La nealta homo maljuna, en nokta vesto — vere ne montris ian timigan aspekton. Ekkoninte nin kun ĝojo li aŭskultis la ,,telegramon'', kiu jam matene aperis plentekste en la 5-a sekreta ordono de la garnizonkomandejo. La unua, kiu aperis hungare, ne germane !

Alitage ĉio okazis laŭ la ordono. Mi — kiel deĵoranto — povis rigardi a ĵurceremonion de sur la etaĝa koridoro. En la korto de la malnova kazerno flirtis la hungara flago kaj ĉeestis mem subkolonelo Hölzl kun larĝa trikolora rubando ĉirkaŭ sia oficira nigra ĉapo.

Dume en la urbo fondiĝis la loka Nacia Konsilantaro. En la urbo regis ordo kaj paco kaj — granda ĝojo. Pri ĉio detala raporto aperis kun mallongigita teksto de ,,mia telefonordono'' en la ĵurnalo de Szabadka.

Sed baldaŭ la ordo komencis renversiĝi. Tre proksime estis jam la serbaj trupoj. Sen soldatoj ni ne povis defendi la urbon, ja regula armeo jam ne ekzistis, — oni rajtis fondi ,,nacian gvardion'' por teni la ordon. Ni, ne Zomboraj oficiroj fondis oficiran taĉmenton kune kun kelkaj fidelaj soldatoj. Nia komandanto fariĝis kapitano Makay kaj mi — lia adjutanto. Kiam ni sciigis tion en la kunsido de la Nacia Konsilantaro, unue oni protestis: estas ribelo fari apartan militistaron. Kiam kapitano Makay kune kun la oficiroj forlasis la ĉambregon, la Zomboranoj tuj rekonsciiĝis kaj deklaris la aferon miskompreno.

Dum tri tagoj ni penis konservi la ordon, sed ni sentis, ke ni ne povos pli longe resti. Mi eĉ nun posedas la koncepton de la vojaĝpasporto pretigita de mi mem, kaj laŭ tiu la Nacia Konsilantaro ordonis kunmeti por ni vagonaron, kiu — pro troŝarĝo de la ĉeftrakoj — sur flankaj reloj veturu ĝis Budapeŝto, kaj ĉie la Naciaj Konsilantaroj devas helpi nin kaj zorgi pri nutrado.

Tiel nia trupeto — kun maŝinpafilo sur la lokomotivo — faris plurtagan veturon kun multaj haltejoj. Dumvoje ĉiam elvagoniĝis tiuj, kiuj loĝis proksime. Ĉe sia bieneto ankaŭ kapitano Makay forlasis nin.

En la Budapeŝta stacidomo estis granda kaoso. Neniu povis ie anonci sin. Mi aperis hejme je ĝenerala ĝojo. Laboron mi ne ricevis. Des pli mi eklaboris en la E-movado, helpis kaj eĉ aranĝis, kie mi povis. Kamarado *Zsámboki* invitis min al granda riparejo de la ŝtatfervojoj, kie antaŭ centoj mi parolis pri Esperanto kaj Internacio. Simile mi parolis en granda kazerno ,,*Maria Terezia*'', kie ĉefleŭtenanto Gfellner estis tiam inter la gvidantaj esperantistoj. Tie fondiĝis, kiel multloke, Soldata Konsilantaro. Eble tiuj faktoj influis, ke la ,,Budapeŝta Laborista-Soldata Konsilantaro'' poste deklaris deziron enkonduki kaj uzi Esperanton. Laŭ niaj alvokoj simile faris kelkaj provincaj konsilantaroj. Nia agado pligrandiĝis dum la Konsilantara Respubliko. Mi mencias nur, ke pro agado de konata entuziasmulo Aleksandro *Laquer* estis ministra ordono, laŭ kiu kune kun aliaj ankaŭ mi povis instrui Esperanton printempe en kelkaj lernejoj, eĉ en gimnazio.

Mi ekirigis grandformatan gazeton ,,Hungara Revuo'', eldonitan de la instrua ministerio, ankaŭ konatan broŝuron de Béla *Kun*, tradukitan de mi. Kaj tio estis poste minaca por mi. Post falo de la revolucio foje kondukis min detektivo al policejo, kie oni enkarcerigis min. Sur la detektiva papernoto estis: ,,Komunista agitisto, redaktoro, broŝuro de Kun . . .''

Sed Esperanto helpis. Mia patro sciigis subkolonelon Aŭgusto *Marich*, kiu estis antaŭ la milito poŝtŝparkasa oficisto, tre agema esperantisto kaj dum la revolucio gvidanto ĉe Ruĝa Gvardio. Nun li servis ĉe la Ministerio por internaj aferoj. Li tuj parolis kun la policestro, kaj post enprotokoligo, ke mi faris nur Esperantajn tradukojn, oni forlasis min. Mi iĝis libera, sed ne emis aktive partopreni en la politiko, nur agadi per Esperanto en la kultura turisma vivo.

Paŭlo Balkányi

Aster-ornamitaj soldatoj sur Budapeŝta strato

KÁLMÁN MIKSZÁTH:

La ĉevalo, la ŝafideto kaj la leporo

Du tre malgajajn periodojn mi havas, kiam mi ne povas rideti; se mi verkas dum tiu ĉi tempo, ne prenu miajn verkaĵojn en viajn manojn, — se vi ne ŝatas la amarajn pensojn.

El tiuj ĉi du periodoj unu apartenas al la varmega somero, kiam la urbanoj ekiras al la arbaroj. Ankaŭ mi mem iras kune kun mia familio, sed mi devas lasi „iun" ĉi tie. La alia periodo koncernas la mornan vintron, kiam la arboj ekiras al la urbo.

Unu abio el la arbaro, unu eta arbo (el la pli malmultekostaj) alvenas ankaŭ mian loĝejon, sed tie ĝi jam ne trovas „iun". Li nomiĝas „iu". Ne licas nomi lin alimaniere. Ankaŭ liaj fratetoj diras tiel, se ili mencias lin, se elfalas el iu tirkesto viptenilo, aŭ butoneto de la ruĝa veŝteto, aŭ malgranda martelo. „Al kiu ĝi apartenas, infanoj?" Time ili respondas, mallaŭte diras: „Ĝi apartenis al tiu iu!" Aŭdante lian veran nomon mia koro peziĝas, kvazaŭ ĝi estus muelŝtono, miaj du okuloj malsekiĝas, kvazaŭ ili estus du putoj.

Nur unikan tason havas nia domo, sur kiu estas skribita lia nomo: „Johaneto". Li trinkadis sian kafon el ĝi, li kaj la kato, ĉar la duonon de ĝi li ĉiam donis al la kato. Nun mi matenmanĝas el tiu taso. La kato malgaje rigardas tion el la malproksimo, kvazaŭ ĝi demandus: „Kie estas mia eta mastro?"

Eĉ tiu ŝtono povas turniĝi, kiun oni ĵetas en la akvon. La ondo ĝin levas, kaj turnas ĝin aliflanken, sed mia malĝojo neniam povos turniĝi.

Mi fuĝas de la rememoroj, sed ili svarme tumultiĝas antaŭ min. De ili mi forkuras, sed samtempe mi allogas ilin al mi. Tie staras sur mia skribotablo liaj plej amataj bestoj, per kiuj lastan fojon li ludis, kiujn ne licas formovi de tie. La ĉevalo kun la selo, kun sia orflava kolhararo, la leporo kun la ruĝa rubando, la ŝafideto kun la sonorileto sur la kolo. Ili rigardas min rigide, silente, dum mi verkas, kaj subite ĉe iu linio, se mi puŝetas hazarde libron aŭ skribaĵon per mia kubuto, eksonoras la sonorileto sur la kolo de la ŝafido.

Kling — klang! Kling — klang! Kie estas nia eta mastro? Kie estas nia eta mastro, kiu trinkigis nin, manĝigis nin, kiu karesadis nin per siaj manetoj, kiu metis nin sur la verdan tapiŝon por paŝtiĝi.

Kial vi demandas — kie li estas? Ja li lasis al vi sufiĉan lokon por paŝtiĝi. Tiun vastan kampon, kie mia gajo floris iam . . . Ja ankaŭ lastfoje li pensis pri vi. Per sia agonia voĉo li vokis vin: mia ĉevaleto, mia ŝafideto!

Li estis ĉiam tiel malforta, malgrasa knabeto. Li ne volis manĝi. Kvankam la kuracistoj ĉiam diradis: „Johaneto bezonas precipe viandon, por ke li iĝu muskolhava, por ke li estu forta."

Kiom da inventemo, kiom da artifiko mi bezonis por konvinki lin. Ĉar li ŝatis plej malmulte la viandon.

Bildlibron mi promesis al li. Ĝi estis utila por unu tago, dum li la libron trafoliumis, alian tagon denove li ne manĝis. Mi portis al li centojn da ludiloj. Sed tio kiel finiĝis? Li ne povis ekŝati la viandon, sed li ĉesis ŝati la ludilojn.

Poste vane mi promesis ion ajn, li nur ekskuis sian blondetan kapeton:

— Mi ne manĝas, mi ne manĝas.

— Post unu jaro mi aĉetos por vi veran ĉevalon.

— Tamen viandon mi ne manĝas.

— Mi metigos spronojn sur viajn etajn botojn.

— Ho, viandon mi ne manĝas!

Foje mi sidigis Johaneton en mian sinon, kaj mi komencis klarigi saĝe al li la aferon.

— Domaĝe, ĉar granda malbono sekvos el tio, se vi ne manĝos la viandon.

La brilajn okulojn, tiujn ĉarmajn okulojn li levis scivole al mi, ke kia malbono devenos el tio.

— Ĉar kiam vi iĝos dudek-jara, tiam mi portos vin al Vieno.

— Kie la reĝo loĝas?

— Jes, kie la reĝo loĝas, ĝuste al li, mia karega.

— Ĉu ankaŭ panjo venos kun ni?

— Panjo ne venos kun ni. Mi portos nur vin, ĉar vi devos tie vetlukti kontraŭ la filo de la reĝo.

Lia ridetanta mieno serioziĝis, aperis maljuneca sulko sur lia alta, glata frunto, dum lia koreto laŭte pulsadis. Estis en ties pulsado kaj timo kaj fiereco.

— Ĉu tio estos vera, paĉjo?

— Tio estos vera, se mi diras, nur la afero sukcesu, ĉar se vi estos la pli forta en la lukto, tiam vi gajnos la landon, sed se la filo de la reĝo estos la pli forta, la lando restos al li, — kaj oni vin enkarcerigos.

Liaj okuloj ekbrilis, kaj por konsoli min, li karesis mian vizaĝon per siaj molaj manoj.

— Ŝajnas al mi, ke mi estos la pli forta.

— Sed al mi ne tiel ŝajnas, — mi diris riproĉe, — ĉar la filo de la reĝo manĝas ĉiutage funton da viando, por ke lia forto kresku, kaj vi ne volas manĝi. Vi nur malgajigas mian koron, kaj ne reakiros la landon por la hungaroj.

Johaneto estis konvinkita.

— Oni rostu por mi du funtojn da viando — li lispis ordone.

Kaj ekde tiu tago li iĝis obeema viandmanĝanto, kaj se kelkfoje malfortiĝis en li la volo, sufiĉis la admono dum la manĝado:

— Johano, Johano, oni venkos vin en Vieno, vi vidos tion!

Li vivis por tiu ideo, dum li vivis Por tio li manĝis, pri tio mi devis rakonti al li ĉiuvespere. Nur al la Viena batalo li pretiĝis konstante. Eĉ, li dispartigis jam la landon gajnitan inter siaj fratoj: Laĉjo ricevis ĉiujn bovojn, kiuj estis en la lando, Alberto ricevis la bovinojn. Al mi li donis el ĝi la homojn (escepte la domzorganton kaj Sofinjon, — la maljunan nutristinon. Li rezervigis ilin nur por si mem.)

Sed foje li aŭdis, — en la kuirejo la servistinoj malkaŝis — ke la filo de la reĝo mortis.

Kompatinda fileto mia, li tute malgajiĝis pro tio.

— Se estas tiel, kontraŭ kiu mi luktos?

Ho, ne estis jam malproksime tiu fantomo, kun kiu li devis interbatali. La difterio. La plej terura generalo de la morto. Dudek kvar tagojn li batalis kontraŭ ĝi, kaj se li manĝus pli da viando, li estus venkinta la difterion.

Ho, kiaj dudek kvar tagoj ili estis! Se mi havus koron, por priskribi ilin.

Kiam li agonie vokis min al sia liteto, kaj flustris en mian orelon:

— Paĉjo, se mi mortos, zorgu pri miaj bestoj, donu ilin nek al Laĉjo, nek al Alberto, ĉar ili disrompus tiujn.

Ankoraŭfoje li volis vidi ilin.

La patrino portis al lia lito la ĉevaleton, la ŝafideton kaj la leporon.

Li rigardis, rigardis ilin, liaj manoj estis jam malfortaj eĉ por preni ilin.

Poste denove li vokis min mane, kaj tre sekrete li metis brilan ormoneron en mian manon. (Ĝin li ricevis de la kuracisto, ĉar obee prenis la kuracilon.)

— Ĉu vi donas ĝin al mi, Johaneto mia?

— Por la manĝaĵo de la bestoj — li respondis mallaŭtvoĉe.

*

Denove staras ĉi tie en la ĉambro la kristnaska arbo.

Eklumigu la kandelojn sur ĝi, ĉu ili povas ankoraŭ brili, lumi? Do, envenu la infanoj. Ĉio estas en ordo! Ĉio estas la sama sur ĝi, kiel pasintjare. Ho, ĉu la nuksarboj vere donis nuksojn ankaŭ ĉi-jare?

Ne, ne! Puŝu flanken tiujn ĉi aĉetitajn, novajn aĵojn. Oni devas starigi ĉi tien, sub la abion, la ĉevalon kun la orflava kolhararo, la leporon kaj la ŝafideton, kiujn mi devas manĝigi el tiu kupromonero.

Ili staris ĉi tie pasintjare, staru do ili ĉi tie ankaŭ ĉijare. Skuu vin, ŝafideto mia, mi aŭdu la kortuŝan voĉon de via sonorileto:

— Kling, klang! Kling, klang! Kie estas nia eta mastro?!

Tradukis: *Márta VÁRI*

ORIGINALA ESPERANTO-POEZIO

AŬRELO PONORI THEWREWK

Nask. 1921, Budapeŝto. Astronomo. Li estas vicdirektoro de la Observatorio Astronomia „Urânia" kaj scienca redaktoro de la Libroeldonejo „Táncsics"; fervora apostolo de la homa kultura unueco. Li publikigas ekde kvar jaroj ankaŭ en Esperanto sciencajn artikolojn, ĉiujare li prelegas en la Somera Esperanto Universitato en Gyula. Samtempe li verkas beletraĵojn. Nun ni prezentas kelkajn el liaj poemoj verkitaj originale en Esperanto

KIEL FORGESI?

Kiel mi povus forgesi
la homan rostitan oston
en praa groto Pekina?

Kian karnon vi manĝis
ĉe via unua fajro,
mia prahomo-patro?

Kiel mi povus forgesi,
kiel, la duan fajron,
la cindron Hiroŝiman?

Diru, al kiu leviĝis
via unua ŝtonklabo,
mia prahomo-patro?

KREINTO-SORTO

Mi kreis viajn du okulojn
kaj pentris — kreinto-amanto;
en ili laŭ deziro mia
verdas la Promesita Lando.

Mi formis vian vangooston
kaj mi ĝin kovris tiel mole,
belegas sur ĝi sep koloroj,
ĉar mi ĝin pentris tiel, vole.

Kaj buŝon vian por la kiso
mi volis laŭ la mia formi:
nenio sen mi estas sur vi,
ĉar ĉio estas per mi, por mi,

staturon vian por kuniri
mezuris mi, ho karulino . . .
Ŝi pretas nun, kaj min forlasas,
min, la kreinton, laŭ kutimo.

ASTRA INAŬGURO

Ekvidis mi en, pura, sorĉa nokto
ĉielon. Kia arĝentpolva ard'!
Ekkonis mi la plej belegan astron,
tra l'spacoj nun kuregas la rigard'.

Post jaroj, eble post miloj da jaroj
reflugos la rigardo: sortplenum',
ja en alia pura, sorĉa nokto
poeton inaŭguros astra lum'.

ELEGIO DE LA FELIĈO

Atingis celon vi, irinte
ĝis montopinto suprenkure.
De tie — vidu — ĉiu vojo
al la abismoj kuras nure.

Vekriu do: kion vi serĉis
en vin', knabin', scienco, kanto:
vi staras tie, en la fremda,
tepida, nekonata lando.

Vin senagigas la kvieto,
foras dezir' frenez-avida.
Ho, vi feliĉas: vi jam mortis,
vi estas jam entombigita.

LA VENTEGO

Foje la ŝtorm' pro la dezir' senfina
renverson volas, kaj irante ek,
de nekonata lando malproksima
trans foraj limoj zumas la venteg'.

Ĝi piedbati durajn murojn povas,
tegoloj tintas, flugas la tegment',
sed kun la krucoj staras kaj ne movas
la ĉiamverda hejm' de l'morta gent'.

Ĝi fortostreĉas, ĉielrando ruĝas,
disfalas poste fine ĝia fort',
kaj pri deziroj vanaj kaŝe flustras
poemon tristan apud mia pord'.

Portreto pri filmreĝisoro András Kovács

Informo en ĵurnalo

„La ĵurio de la filmfestivalo en urbo *Pécs* juĝis la premion por la plej eminenta hungara filmo de jaro 1968 al la reĝisoro de „Muroj" *(Falak)*, al Andreo *Kovács* ... En la filmfestivalo estis evidente jam de komenco, ke por la unua loko konkuras esence la „Muroj" kaj la „Steluloj, soldatoj", do la filmoj de A. *Kovács* kaj M. *Jancsó* ... En la filmoj de Jancsó la folkloraj trajtoj estas pli fortaj, la karakterizaĵoj aludantaj al aliaj artoj memorigas nin pri la nomoj de *Bartók*, *Derkovits* kaj M. *Borsos*, — aliparte la kreaĵo de A. Kovács montras prefere filozofian koncipiĝon, ĝi memorigas nin je *Ady*, Attila *József* kaj Georgo *Bálint* ..."

Kritika eĥo de „Muroj"

„Tiu ĉi filmo kun profunda kaj fortoplena intelekteco en sia signifo kreskas trans la nacian medion, ĉar muroj ekzistas en ĉiu socio." — MORNING STAR

„La vero estas por Kovács ju pli homa, des pli revolucia." — L'HUMANITÉ

„La »Muroj« temas pri tiuj muroj, kiuj en ĉiu formo de la socio, eĉ en la plej libera formo, ĉirkaŭprenas la homon, — kaj ankaŭ pri tiuj muroj, per kiuj ni ĉirkaŭbaras nin mem. La du aferoj kompreneble estas kunligitaj — kaj ties konsiderado estas la filmo mem." — NÉPSZAVA (Popolvoĉo)

„Kial estas la »Muroj« grava filmo? — Ĉar ĝi temas pri la plej esencaj fenomenoj de nia vivo. Plej mallonge dirite, temas pri tio: kie la politiko formiĝas ne dum la alternado de la partioj, tie en sama tempo la samaj personoj devas esti »registarpartiaj« kaj »opoziciuloj«. Nur tiel oni povas malhelpi, ke nia socio difinante al si kiel celon la revolucion kaj socialismon, peziĝu kaj ekstagnu." — KÖZNEVELÉS (Publika instruado)

„MUROJ emfazas la penson pri neceseco de la kolektiva agado. La socialan sintenon ni ĉiuj formadas, do ni estas ankaŭ responsaj pri tio." — ALFÖLD (Ebenaĵo)

Antaŭ nelonge aperis libro de A. Kovács kun la titolo: „Ekde la ideo ĝis la filmo — Muroj." En la ĉapitro: „Imagita konversacio el realaj elementoj — kun 62 spektantoj" li skribas (kompreneble nur kelkajn detalojn ni povas represigi el tiu longa studo):

La ĉefrolantoj de mia nova filmo „Muroj" estas samtempuloj, mia propra generacio ... Mi apartenas al tiu aĝoklaso, kiu ekiris post la liberiĝo, kiu ankoraŭ tute juna, ankoraŭ en la universitataj benkoj aktive entrudiĝis en la sociajn batalojn, kelkfoje en strikta senco de la vorto — interbatadis por la plugvidado de la elformiĝanta socitransformo. Post tiuj agemaj jaroj ni devis travivi ankaŭ multajn krizajn periodojn, kaj tiuj ĉi krizoj tuŝis nin pli, ol la pli junan aŭ pli maljunan aĝoklason. Post 1956 volonte oni nomis tiun ĉi aĝklason „perdita generacio", kiu neniam povos resaniĝi el tiuj animskuiĝoj. Ĉu efektive perdiĝis tiu ĉi generacio, tion provas esplori „Muroj", sed ĝi esploras ne la historion, sed la hodiaŭan situacion de ĉi tiu generacio.

Al tiu ĉi aĝoklaso apartenas granda parto de homoj en gvidaj postenoj, tiu klaso devas do surpreni la respondecon pri sia ago, ĉu ĝi volas, ĉu ne. (Nur parenteze: kiam mi parolas pri generacio, mi ne pensas je ĉiuj miaj samtempuloj ĉirkaŭ 40-jaraj; mi provas esploradi la konturojn ne de unu aĝoklaso, sed tiujn de unu sinteno, kiu estas valida kaj por la pli junaj kaj por la pli maljunaj ol ni, — sed ne estas valida por tiuj miaj samtempuloj, kiuj nur vegetadas, adaptiĝante al cirkonstancoj vivadas, eventuale ili elektas la komforton de la ĉiama sincera interkonsento kun ĉio. Mi okupas min pri tiuj, kiuj enestas en la aferoj, kiuj surprenas la riskon de la ago.)

1-a Spektanto: *Ĉu vi supozas, ke la spektanto ne-intelektula komprenos la filmon?*

Reĝisoro: *Eblas, ke spektanto, kiu ne alkutimiĝis al tiaj diskutoj, preteriras kelkajn frazojn, ne enkapigas ĉiujn dialogojn, sed ja tio ne estas esenca, se li perceptas la bazan situacion, la danĝerigitan staton de la heroo* Ambrus, *do tiun demandon, ĉu malĝusta frazo aŭ nepripensita ago povas neniigi la plenumaĵojn de longaj jaroj ... Kaj tiu zorgo apartenas ne sole al intelektuloj.*

1-a Spektanto: *Do ĉu vi fidas je tio, ke la spektanto transmetas en sian percepton la sencon de la filmo „Muroj"?*

Reĝisoro: *Miaj du unuaj filmoj, „Obstinaj homoj" kaj „Malvarmaj tagoj" alportis al mi sufiĉe esperigajn spertojn, kvankam ambaŭ filmoj parolis ankaŭ pri aliaj aferoj, kiel mem la vortoj de la dialogoj.*

1-a Spektanto: *Sed la „Obstinaj*

homoj" havis apenaŭ pli ol cent mil spektantojn . . .

Reĝisoro: *En kinejo. Sed post la televida prezentado mi ricevis plurajn centojn da leteroj, kaj pri la filmo oni diskutadas ankaŭ nun, post kvar jaroj.*

7-a Spektanto: *Kial malinklinas la pli larĝaj tavoloj de la publiko al tiuj novaj filmoj, kiuj plaĉas al vi?*

8-a Spektanto: *Laŭ mia opinio multaj tial ne komprenas tiujn ĉi novajn hungarajn filmojn, ĉar ili ne komprenas eĉ la socion, en kiu ili vivas.* Oni devas ankaŭ la vivon senti por povi kompreni tiujn ĉi filmojn, kreitajn kun altgrada arta pretendo.

Reĝisoro: *Mi tute konsentas, kaj al tio mi aldonas nur tion, ke ne nur la enhavo de la prezento, sed ankaŭ ĝia formo diferencas de la kutimita, — kaj tio ne povas esti alimaniere. Eĉ tio estas fonto de multaj kontraŭstaroj. Ĉe ni granda parto de la publiko — en plej bona kazo — ankoraŭ estas ĉe la gustetoso de la 19-a jarcento, — kaj estas jam rezulto, se ĝi atingis tiun gradon. La laŭtempa figurado puŝiĝas al la normoj de la nur antaŭ nelonge atingita vidmaniero, kaj ni ja scias, kiel egan forton havas la kutimo.* La moderna arto konsideras la publikon ne konsumanto, sed kun-aŭtoro, kiu per siaj propraj asociadoj, travivaĵoj kaj spertoj la verkon kompletigas. *Hodiaŭ povas aserti jam nur la plej primitiva demagogio, ke Picasso pro tio ne desegnas la tutan figuron tia, kia ĝi estas, ĉar li ne scias desegni, aŭ la moderna skulptisto tial deformas la korpon, ĉar li ne scias modli iun figuron fidele al la natura aspekto . . .*

19-a Spektanto: *Jes, jes, sed ankaŭ tio havas danĝerojn, se ni portas antaŭ la amasojn ne pridiskutitajn, ankoraŭ ne maturiĝintajn problemojn. Ankaŭ en „Muroj" aŭdiĝas multaj opinioj, kiujn oni povas miskompreni aŭ misklarigi.*

Reĝisoro: *Ĉiu diskuto kaj ĉiu ago havas ian riskon, kiun ni aŭ surprenas, — aŭ rezignas pri la ago. Sed ĉu iu jam mezuris, kian malutilon kaŭzas, ke ofte ni ne daŭrigas iun pensovicon, ĉar ni ektimas pri la konsekvencoj? . . . Kvazaŭ senfekundiĝas la pensoj, fariĝas amaraj, inversaj, kiel kelkfoje ankaŭ la pasioj, la sentoj, se ili ne povas elvolviĝi. Ankaŭ la spirita vivo havas sian „fiziologion", la individua same, kiel ankaŭ la spirita vivo de la socio. Estas bezonataj „metabolo", novaj pensoj kaj liberiĝo de la elmodiĝintaj malnovaj aferoj. Se oni ne uzas la organismon, la spiritaj muskloj fariĝas pigraj, malfortiĝas ilia rezistkapablo, ilia elasteco . . . Estas bezono je publika vivo, je publika opinio, kie estas eblo por publikaj fortoprovoj, kie povas venki la pli bona, — kaj se iu malvenkas, ne falegas kaj ne neniiĝos lia ekzisto.*



La reĝisoro kaj Zoltán Latinovits, la ĉefrolanto de la filmo

31-a Spektanto: *Kion vi komprenas sub „muroj"?*

Reĝisoro: *Tiujn kadrojn, inter kiuj ni vivas. Tiuj ĉi kadroj ne ĉiuj estas nepre detruendaj. Ekzemple la muroj de tiu ĉi ĉambrego nun estas speciale bonaj por ni, ĉar ekstere pluvas kaj estas malvarme. Do sub muroj mi ne komprenas nepre malhelpan cirkonstancon. Laŭ mi oni ataku nur tiujn murojn, kiuj estas pli proksime, kiel tion ebligas la objektivaj cirkonstancoj, sed eĉ tiam oni ne ataku la murojn per kapo, sed prefere per pioĉo. Tamen en certaj okazoj la tasko estas, ke ni iru ĝis la muroj, do ni eluzu la estantan ŧerenon.*

32-a Spektanto: *Mi apartenas al tiuj, kiuj alte taksas la novajn hungarajn filmojn. Kion vi opinias? Kio kaŭzas tiun ĉi prosperon? Kaj kio estas ties kaŭzo, ke tiu ĉi prospero esprimiĝas ĉefe en historiaj filmoj? (Hajdukoj, Malvarmaj tagoj, — sed ĉi tie ni povus mencii ankaŭ la filmojn „Dekmil tagoj" kaj la „Patro".)*

Reĝisoro: *Mi ne volas subtaksi tiun novan, kiun tiuj ĉi filmoj alportis en la nova vidmaniero de nia historia paseo, sed ilian veran signifon mi vidas tamen en tio, ke* citante ankaŭ la ekzemplojn de la historio, ili esploras laŭ nova maniero la nuntempajn problemojn de la homaj interrilatoj. *Kaj kiel ankaŭ la hodiaŭo ne estas komprenebla sen likvido de la paseo, tiel ne estas elformeblaj ankaŭ novaj interrilatoj, se ni ne konsideras, pri kia heredaĵo ni disponas, de kio ni devas liberiĝi, kiuj estas la danĝeroj, kiuj ankoraŭ minacas nin.*

56-Spektanto: *Ĉu vi pensis pri tio, ke vi daŭrigos la filmon „Muroj" en nova filmo?*

Reĝisoro: *Mi ne havas tian planon.*

57-a Spektanto: *Kial vi ne faras filmon ankaŭ pri la laboristoj?*

58-a Spektanto: *Ĉu vi planas filmon pri la gejunuloj?*

59-a Spektanto: *Kial vi ne figuras foje la intelektulinojn, estantajn en la sama situacio?*

60-Spektanto: *Kial vi ne faras komedion?*

61-a Spektanto: *Multaj romanoj de Jókai ankoraŭ ne estas filmigitaj. Kial vi ne reĝisoras tian filmon?*

62-a Spektanto: *Kial vi ne faras filmon pri la amo?*

El la hungara: L. Kökény

D-RO ISTVÁN SZERDAHELYI

„Esperantisto estas nomata ĉiu persono,
kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto . . ."
(El la 5-a § de Bulonja Deklaracio, 1905)

ESPERANTO-INSTRUADO:

METODO KAJ METODOJ

Laŭ citita paragrafo de Bulonja Deklaracio: esperantisto = homo parolanta Esperanton, laŭ la Plena Vortaro: „esperantisto = persono kiu scias kaj uzas Esperanton." Por scii Esperanton oni devas ĝin lerni. Lerni oni povas individue el iu lernolibro (= memlernado) aŭ en iu kurso, partoprenante iun instruadon. En la amasa disvastigo de la lingvo tiu dua formo ludas gravan rolon, do en la sekvaj vicoj temos ĉefe pri la problemoj de Esperanto-instruado.

La unuaj apostoloj de la Internacia Lingvo instruis al centoj kaj varbis ĉiam novajn adeptojn el kiuj multaj poste mem instruis daŭrigante tiun noblan laboron, transprenante ne nur la entuziasmon de ilia instruinto, sed ankaŭ ilian metodon. La plimulto de tiuj unuaj instruantoj ne estis laŭfakaj pedagogoj. Ili lernis la lingvon, parolis ĝin, observis la metodon, laŭ kiu instruis ilia instruisto kaj imitis lin. Tiel elformiĝis dum la unua periodo vico de tre talentaj „denaskaj" pedagogoj, kiuj tre sukcese transdonis sian scion al la sekva generacio. Neniam ili okupiĝis pri la teorio de instrumetodo, ne konis ili eĉ la bazprincipojn de la metodiko, tamen, ili brile instruis kaj se oni demandis ilin laŭ kiu metodo ili instruas, ili respondis ĝenerale, ke laŭ Ĉe-metodo. Vere, unue disvastiĝas en Esperantomedioj tiu instruprocedo, kies principojn formulis nia samnaciano Andreo CSEH. Elformiĝis ia instrumetoda stafeto: Andreo Cseh transdonis persone sian metodon al iu grupo, kies membroj poste transdonis la torĉon al aliaj ktp. Sed tiu stafeto poste ĉiam malpliiĝis: malkreskis la nombro de veraj Ĉe-instruistoj, kiuj kapablis transdoni ne nur lingvokonon, sed ankaŭ metodon kaj emon al la lingvoinstruado. Ĉar ĉi tiu metodo ne uzas lernolibron kaj ne havas ellaboritan metodikon, ĝi estas alproprigebla nur en Ĉe-metodaj kursoj. Sed ankaŭ tie ne ĉiuj komprenas la esencon de la metodo. Mem Andreo Cseh devis publikigi la sekvan anoncon: „Ĉar okazis, ke iuj samideanoj anoncis siajn kursojn sub la nomo „Ĉe-metoda kurso", sed bedaŭrinde ili faris fuŝajn kursojn sensukcesajn kaj per tio malutilis al la varbita publiko kaj al mi, mi devas insiste peti, ke nur tiuj samideanoj uzu mian nomon en la reklamoj por siaj kursoj, kiuj petis kaj ricevis de mi specialan skriban konsenton por tio. Andreo Ĉe." Kaj kiom da instruantoj anoncas ankaŭ hodiaŭ Ĉe-kursojn, kiuj pensas, ke, se ili montras kelkajn pupetojn kaj skatolojn tiu jam estas Ĉe-metodo!?

Lasttempe la problemoj de Esperanto-instruado krute ŝanĝiĝis.

Esperanto enpenetris en kelkajn oficialajn institucioj n, en lernejojn kaj kulturdomojn. Ĝi estas instruata paralele kun aliaj fremdaj lingvoj, kiu ebligas la komparadon inter la kursoj ankaŭ el instrumetoda vidpunkto. Ĉar la instruanto estas pagita, oni sisteme kontrolas lian laboron kaj observas lian metodon. Tiu komparo, kontrolo kaj observado okazas flanke de superaj instancoj, kiuj ne estas ĉiam favorantoj de Esperanto. Sekve ni devas certigi, ke en tiaj oficialaj lokoj Esperanto estu instruata far de kvalifikitaj instruantoj ĉu laŭfakaj pedagogoj, ĉu ne (escepte la lernejan instruadon, kie rajtas instrui nur pedagogoj). Ĉar ni ne havas sisteme ellaboritan kaj fiksitan instrumetodon de Esperanto, ni devas fiksi almenaŭ kelkajn bazajn principojn, kiuj validas ĝenerale kaj kies precizigo klarigos kelkajn nebulajn demandojn de tiu ĉi problemaro.

La unua demando estas la termino „metodo".

La metodo estas sistema kombinado de rimedoj kaj procedoj por atingi difinitan celon. La metodo rilatas ĉiam al konkreta situacio kaj dependas de konkretaj faktoroj. Absoluta, ĉiam kaj ĉie valida metodo ne ekzistas. Estas nur pli aŭ malpli ĝenerale validaj principoj, rimedoj kaj procedoj.

Ekzistas multaj klasifikoj de metodoj. Ni trarigardu la plej ĝenerale akceptitan:

1. Natura metodo

Plej efike oni alproprigas fremdan lingvon en fremdlingva medio. Vivante en fremdlingva medio oni alproprigas la lingvon imitante la konversacikunulojn.

2. Guvernistina metodo (Fräulein-sistemo)

La infano loĝas en aparta ĉambro kun la fremdlingvana guvernistino, kaj parolas kun li nur en fremda lingvo. Tiu cirkonstanco kvazaŭ anstataŭas la fremdlingvan medion.

3. La gramatika-traduka metodo

estas la unua lerneja metodo, kiu elformiĝis tiam, kiam la latina lingvo disvastiĝis kaj oni instruis ĝin en preskaŭ ĉiu lernejo de la tiam konata mondo. Centran lokon en la instruado okupas la lernolibro. Oni lernas vortojn kaj gramatikajn regulojn kaj surbaze de tiuj konoj kunmetas frazojn (sintezo) aŭ oni legas tekstojn kaj diserigas poste ĝin leksike kaj gramatike (analizo).

4. La rekta metodo

elformiĝis tiam, kiam la evoluanta internacia trafiko postulis praktikan konon de fremdaj lingvoj, do la parolon. Eliminas la uzon de gepatra lingvo dum la instruado, tute ne uzas lernolibron, ne klarigas la gramatikon.

5. La kombinita metodo

elformiĝis el la kombino de antaŭaj du metodoj: forlasis la negativajn kaj konservis iliajn pozitivajn elementojn ellaborinte sisteman, konsekvencan, science esploritan metodon.

Jen tiuj ĉi lastaj tri metodoj ekzistas kaj ĉiu alia „metodo" estas nur varianto de tiuj aŭ tute simple iu procedo.

Resumante el la vidpunkto de lernolibro: la gramatika-traduka metodo baziĝas sur la ekskluziva uzo de lernolibro, la rekta metodo tute ne uzas lernolibron, la kombinita metodo uzas la lernolibron precipe kiel hejman helpilon por la memstara laboro de la lernantoj kaj gvidilo por la instruisto.

(daŭrigota)

Johano Dorosmai:

FABELOJ

El la hungara tradukis
VALÉRIA SZABÓ
Eldonis Hungara Esperanto-Asocio,
24 paĝoj, broŝurita

Valéria Szabó surprizis nin per modesta volumeto, kiu tamen havas sian gravan rolon en la vivo de nia lingvo kaj movado.

La entuziasma kaj agema tradukistino bone elektis la materialon por siaj tradukoj, la fablojn de János Dorosmai, Nestoro de la porinfana literaturo hungara. Liaj fabeloj, pli ĝuste fabloj, ĉar en ili rolas ĉiam nur bestoj, estas spritaj, interesaj kaj instruas pri la bona moralo.

Ĝuste tiajn fabelojn bezonas niaj plej junaj esperantistoj, kiuj nun konatiĝas kun la internacia lingvo. Ili pere de fabeloj povas ekkoni la regulojn de la Esperanta gramatiko kaj novajn vortojn de la lingvo. Samtempe ili edifiĝas, eĉ mem ne rimarkante tion. Ne malpli bone povas utiligi tiuspecajn verkojn la plenkreskaj esperantistoj, kiuj ankoraŭ lernas aŭ ĉiam nur lernas Esperanton. Sed ankaŭ la spertaj samideanoj povas legi kun utilo tiajn fabelojn.

La tradukoj de Valéria Szabó bone transdonas la spriton kaj la spiriton de la originaloj. Ili amuzas kaj samtempe enhavas vortojn, malofte uzatajn en la ĉiutaga Esperanto, kiujn scii tamen estas utile. Ekzemple: *alaŭdo, limako, kropo, hilo, cerambiko* (cerambyx cerdo), *timono, musko, kverko.* Tiel ĉi tiu bukedeto de fabloj estas ankaŭ bona lernilo.

Oni devas do laŭdi la geston de HEA, per kiu ĝi aperigis la recenzatan volumeton.

Tamen kelkaj eble povas riproĉi la tradukinton pro la ne ĉiam necesa apero de kelkaj sufiksoj, ekzemple *-ad-*, pro la nesufiĉe konvena vortuzo kaj pro ioma stila arkaismo. Sed tiuj estas nur la plej severaj kritikantoj de la esperantlingva literaturo.

Tibor Völgyi

Ferenc Juhász:

Konfeso pri la grafika arto de János Kass

Estas jam pli ol unu jardeko, ke mi konas tiun ĉi junan artiston, ια grafikiston kun mano preciza kaj celkonscia, la metiiston konantan kristale klare la leĝojn kaj metodojn de la efektivigo, la eminentan, modernan libroartiston, la sorĉiton kaj inspiriton de la litero, la formoj kaj de la libro. Ankaŭ lin, kiel tiom da liaj kunuloj, miajn amikojn kaj samepokanojn, tiujn, kies emocioj estas pli turmentaj aŭ kiuj havas cerbon plenan de vizioj, tiujn kun pli milda kirliĝo de animo kaj la sin mem serĉantojn mi atentadas kun la sama delikata angoro kaj birda sci-volemo, kun la sama festa ekscitiĝo de tiu, kiu atendas ion gravan, — kiel mi atentas ankaŭ miajn poet-kunulojn, miajn kunstartintojn kaj la plimultiĝintajn junulojn. Mi atentadas, ke kiam maturiĝos ilia arto ne nur memstara, sed ankaŭ laŭleĝa tiel en la konceptado kaj manifestado kiel ankaŭ en la kompreno de la ekzisto kaj en la kono de la monda strukturo, per unu vorto: en la arta realiĝo. Ke kiam fariĝos tiu arto la leĝ-potenca esenco de la unusola vero, kiam ĝi iĝos konfeso, sorto, nealiigebla fato pere de la simpla kaj senindulga senco de la vorto. Ke ĉio nevicigebla, kion ili aplikas aŭ provas uzi, por sin esprimi, — aĵoj kiel ekzemple krajono, plumo, metala nadlo, peniko, ŝtono, argilo, drato, metalo, ĉifono, vitro, farbo, aro da aplikeblaj objektoj, najlo, kandelo, vitroperlo, birda osto, besta haro, skvamo aŭ drat-implikaĵo, — kiam tiuj transformiĝos en sangon-floron, stelon aŭ morton, t. e. en la nealiigeblan esencon de ili mem, de ilia fantazio, de iliaj sinkono kaj mondo, unuvorte, en leĝon. Ĉar la arto estas ne nur la senĉesa, senfina serĉado pri la leĝo, sed estas ankaŭ la realiĝo mem de la leĝo. Serĉi kaj neniam trankviliĝi, jen nia devo. La ne-trankviliĝo, la serĉado penetrita de febro, kiel ankaŭ la ĉiam denove formiĝanta komenco estas la spirita, sed ankaŭ praktika programo de János Kass. — En Orient-Eŭropo kaj ne lastavice en Hungarujo oni devis ripari jarcentojn da postrestinteco ne nur en la historio, sed ankaŭ en la figuraj artoj. Sur tiu ĉi terparto de Eŭropo — tero ofte bruldifektita kaj de vekrioj inundita — la arto havis sian pluson aŭ minuson per tio, ke ĉiam ĝi trenis kun si kiel sangajn flugilojn alkorpiĝintajn al ĝiaj ŝultro-ostoj, aŭ kiel oran palton ĉirkaŭkreskintan ĝian koron, aŭ kiel sonĝon, malbenon aŭ fidon pri misio: la elaĉeto-donan celkonscion. Ni ne povis ankoraŭ ludi, ĉar ni ne havis tempon por tio. Nia postrestinteco, — kiu ŝtele kreskigis en niaj koro kaj cerbo senĉese la emocion entrepreni taskon, kaj elpaŝi el la silento — estis eble la plej granda en la figuraj artoj, unuavice en la grafiko, ilustrado kaj libro-arto. Kaj ĝis hodiaŭ ni faris eble plej multe en ĉi tiuj; kun certeco ni povas diri: ni leviĝis al la nivelo de Eŭropo kaj Ameriko, al tiu de la plej eminentaj en la mondo. Kaj en tiu leviĝo partoprenis tiaj junaj majstroj, kiel János Kass, kiu (nur kiel poeto mi povas diri) konas ĉiujn sekretojn de la metio, kaj konscias, ke la arto ne estas apartiĝo en la ekzisto, sed realiĝo en la ekzisto; ke ĝi ne estas la celo, sed estas la esenco; ke ĝi estas distingiĝo, samtempe identiĝo, kaj tiu ĉi identiĝo kun siaj taskoj portis kun si la kuraĝon identiĝi kun si mem. Animskue bela ekzemplo de tiu ĉi kuraĝo estas la desegno-serio Mozeo al la samtitola ree malkovrita, dua granda teatra verko de Imre Madách. Serio sovaĝe torentanta, barbare ŝaŭmanta ĝi estas, plenplena de morna, nigra sonoro, kun vekriadoj kaj furiozadoj, atendantaj la mesion, vokantaj la Dion. — Per tiu ĉi plor- kaj malben-serio János Kass manifestis sin preta akcepti kaj preni sur sin la arton kiel la sorton mem.

Tradukis: Tibor Ujlaky-Nagy



J.. KASS:
CANTATA PROFANA

J. KASS:
KNABO RIGARDANTA EN LA AKVON



MONDFAMA HUNGARA FABRIKO: MOM

Se ni haltas ĉe angulo de la strato *Csörsz* en *Buda*, ni ekvidas longan, verdan ferbarilon, malantaŭ kiu viciĝas egaj konstruaĵoj. Preskaŭ fabrikurbeto: la Hungara Optikaĵ-Uzino *(Magyar Optikai Művek)*, kiel rezulto de rapidega evoluo en la lastaj du jardekoj, hodiaŭ estas unu el la plej grandaj optikaj kaj preciz-mekanikaj uzinoj de Mez-Eŭropo. Kvin mil homoj laboras en la fabriko, kiu festis en 1968 la 92-jaran jubileon de sia ekzisto. Tio estas tre respektinda aĝo ankaŭ laŭ internacia rilato en tiu ĉi fabrikbranĉo.

Nia kunlaboranto vizitis la fabrikon MOM, ties gvidantojn kaj malnovajn fakulojn. *La ĉefsekciestro Jozefo Jábor parolis jene pri la historio de la fabriko:*

— Longa vojo kondukis de la *„Universitata Mekanika Stacio"* en *Kolozsvár* (nun *Cluj* en Rumanio) ĝis la hodiaŭa *Hungara Optikaĵ-Uzino*. La juran antaŭulon de la firmo ja fondis en 1876 Nándor *Süss* en Kolozsvár. — La firmo rapide evoluis. En 1891 pretiĝis la unua ekzemplero de la *pendolo Eötvös*, baldaŭ fariĝinta mondfama. La pendolon baldaŭ oni liveris ankaŭ por eksporto. En la katalogo eldonita en 1896 ni jam trovas la indikojn pri pli ol 470 diversaj instrumentoj, kiuj servis parte por geodeziaj, arbarkulturaj kaj min-ekspluataj celoj, parte ili estis uzataj en lerneja instruado kaj sur scienca tereno. — Kiam la uzino en 1905 translokiĝis al la nuna loko, al Budapeŝto, la etato jam prezentis super cent laborulojn. Ĉe elekto de la nuna loko havis rolon specifaj vidpunktoj: la sen-skuiĝo de la grundo kaj la senpolva, pura aero.

— En la periodo inter la du mondmilitoj nia uzino trairis egan evoluon. Dum la dua mondmilito la fabriko suferis gravajn damaĝojn, sed tiuj estis baldaŭ riparitaj, kaj de tiam la fabriko konstante progresas.

— Kio estas la sekreto de tiu grandskala evoluo?

— Multaj faktoroj kunefikas, sed unu el la plej gravaj estas, ke ekde la fondo ĝis niaj tagoj ni multege zorgis pri la edukado de fakuloj. *MOM havas proprajn edukinstitutojn*, en kiuj ni edukas niajn fakulojn ekde la bazaj konoj ĝis alteduka nivelo. En MOM troviĝas granda nombro de laboristoj kaj gvidantoj, kiuj laboras en la fabriko jam de dudek jaroj. Estas laborfakoj, en kiuj la fak-scio kaj amo al la fako herediĝas de patro al filo. Tio reprezentas forton, kiun nenio alia povas anstataŭi.

— *Kion produktas MOM?* — ni demandis de la vic-ĝeneraldirektoro d-ro Roberto *Horváth*.

— La produktaĵ-sortimento de MOM estas treege larĝa. Baziĝas sur malnovaj tradicioj la produktado de *geodeziaj instrumentoj. Sur tiu ĉi teritorio ni disponas pri tiel larĝa skalo, kian eble eĉ unu firmo en la mondo ne povus diri pri si.* Unu el la plej bazaj grupoj de la geodeziaj instrumentoj estas la diversaj niveliloj. Simila estas la situacio en la familio de teodolitoj, kie en la lastaj jaroj ni elformis la instrumentojn, provizitajn per aŭtomata alteca indicilo. Tiuj instrumentoj — kompare al la tradicia solvo — plirapidigas la mezuradon kaj faras ĝin komforta. Krom ili ni produktas *mezurtablojn, planimetrojn* kaj *pantografojn servantajn por diversaj kartografiaj celoj* kaj kompreneble por la plej diversaj specialaj celoj servantajn apartenaĵojn kaj helpilojn, kiuj ebligas, ke niaj instrumentoj estu uzeblaj por ĉiuj celoj, de la arkitekturo ĝis mineskspluato, de la arbarkulturo ĝis kartografio. La alia granda familio de la instrumentoj estas tiu de la *laboratoriaj instrumentoj*. Sur la tereno de la kuracista diagnostiko kaj biologio, de la viruso-esplorado kaj plastokemio hodiaŭ jam estas nemalhaveblaj la ultracentrifugiloj. Kaj ankaŭ el tiuj ni produktas tri diversajn tipojn. En la Internacia Foiro de *Leipzig* ricevis oran medalon la unua tipo en 1964, la dua tipo en 1968.

Unu el niaj lastatempe produktitaj instrumentoj estas *Directhermon*, kiu estas la unua termometria analiza aparato kun senpera laŭprocenta deĉifro, uzata ĉe organikaj kaj neorganikaj kvanto-analizoj. Tiu ĉi aparato estas nun unika sur la monda merkato. *En 1968 ĝi ricevis la oran medalon de la Lejpciga kaj la arĝentan pokalon de la Budapeŝta Internaciaj Foiroj.*

— Sur tereno de la hungara instrumento-produktado MOM iniciatis la instrumentojn kun vitrofadena lumigado. La kvalito de lumgvidaj faskoj kaj de iliaj optikaj karakteriziloj estas sur monda nivelo.

— Novajn evoluajn kaj fabrikadajn branĉojn formas en MOM la periferiaj unuoj de elektronikaj komputiloj, la bendotruiloj kaj bendolegiloj.

— Ni produktas en granda kvanto okulvitro-lensojn, okulvitro-garnaĵojn, sunvitrojn kaj vekhorloĝojn por enlanda vendado kaj por eksporto.

Ni produktas krome diversajn fluidaĵ-mezurilojn, kaj krom la menciitaj estas en la stato de evoluigo aŭ enkonduko multaj instrumentoj.

— *Kiel havas la fabriko tiom da evoluiga kapacito por konstante efektivigi en multaj diverĝaj fakterenoj konstrukcioj*n[1] *novajn kaj kontentigantajn la pretendojn de la mondmerkato?* — ni metis la demandon al la teknika progresiga ĉefsekciestro Jenő *Fügedi*.

— Por la naŭdek-jara agado de la fabriko estis ĉiam karakteriza la klopodo al altgrada scienca kaj teknika pretendo. En nia progresiga agado ni apogas nin unuavice je niaj propraj esploristoj kaj konstrukciistoj,* sed ni havas striktan rilaton kun la universitatoj kaj kun la sciencaj esplorinstitutoj. La prototipojn de niaj instrumentoj antaŭ la produktado elprovas esplorinstitutoj, laboratorioj de hospitaloj kaj aliaj uzantoj, — kiuj donas pri ili fakan opinion. Nur tiel estas certigeble, ke en ĉiu produkta branĉo ni konstante iru egalpaŝe kun la internacia nivelo, kaj en la evoluiga laboro ni eĉ antaŭu ĝin.

— La produktaĵojn de MOM antaŭe eksportis *Metrimpex* Entrepreno por Ekstera Komerco. Sed de la 1-a de januaro 1968 la Hungara Optikaĵ-Uzino MOM transprenis la rajton de eksporto de la geodeziaj kaj laboratoriaj instrumentoj, kies eksportkvanto estas la plej granda.

— *Pri la spertoj de la memstara eksportagado kaj pri la perspektivoj de la estonto* ni demandu la gvidanton de la merkatesplora kaj propaganda sekcio, Georgo *Wegenhoffer*.

— La pretendoj de la mondmerkato en la lasta jardeko kreskegis. Akriĝis la batalo por la merkato. Ne estas do facile stari stabile sur la foiro de teknikaj artikloj. *Ni eksportas niajn produktaĵojn en pli ol 60 landojn kaj en pli ol 30 landoj ni disponas pri reprezentado kaj servado.*

En 1968 ni ekspozis en pli ol tridek ekspozicioj, internaciaj foiroj, kongresoj kaj konferencoj. Ni plilarĝigis nian kooperan laboradon kun la firmoj de la okcidentaj kaj evoluantaj landoj

— Ni havas ankoraŭ multajn solvendajn taskojn, sed la atingitaj rezultoj kaj la sukcesoj rikoltitaj en la ekspozicioj atestas pri tio, ke la memstara eksporto rezultos pluan evoluon de la fabriko, pluan kreskadon de la nivelo de produktaĵoj.

J. D. Tradukis: L. Kökény

* *konstrukcio* = konstrumaniero, konstruplano (G. Konstruktion, Bauart; A, F construktion; H konstrukció). Uzita en Wüster G—E Enciklopedia Vortaro kaj uzota en Duden-Bildvortaro de Hafenkorn.

Turisma Vortaro de Alfonso Pechan

Hungara- Esperanta kaj Esperanta- Hungara en unu volumo, bindita. Eld. Terra, 1968. Formato 12 × 8 cm, 510 p + 24 p. Suplemento + 24 p. por notoj. Prezo: 33 Forintoj. Eldonnombro: 5000. — Lektoris d-ro K. Kalocsay.

La Univ. Kongr. en Madrid ĵus esprimis deziron aperigi *Fakan Vortaron de Turismo* kaj jen hungara eldono de tia vortaro por vojaĝantoj jam aperis. Rekonon de tiu pretendo kaj aprecon por Esperanto flanke de Akademia Eldonejo „Terra" montras, ke inter dekduo da alilingvaj turismaj vortaroj ĝi aperigis ankaŭ la esperantlingvan, samtempe kun la 4-aj eldonoj de la du bazaj E-vortaroj de la sama aŭtoro (en po 15 mil ekz. !).

Ankaŭ ĉi volumon, kiel la du bazajn vortarojn kontrolis nia fama lingvisto K. *Kalocsay*, kaj tiu fakto krom la sperto vortarista de la aŭtoro jam donas anticipan fidon pri lingva, sencklariga kvalitoj de la libro — kaj foliumante en la volumo ni ne trompiĝas.

Ĉe tia faka vortaro la unua problemo certe estas: kiel elekti la vortostokon por plej efike servi la bezonojn de la vojaĝanto hungara en eksterlando, kaj samtempe servi fremdlingvulojn, kiuj vizitas Hungarion. La vortostokon la aŭtoro prete ricevis, ĉar li povis (aŭ devis) transpreni la hungaran vortoliston de la aliaj turistaj vortaroj de Terra (preserareto sur la ena titolpaĝo: la hungara vortostoko ne *bariĝas*, sed *baziĝas* sur la hungara-franca turista vortaro !). Kiel ni konstatas, el la po 13 mil vortoj de ambaŭ partoj proksimume la duono estas el la ĝeneralaj, ĉiutagaj vortoj kaj la ceteraj, verŝajne pli ol 6 mil, klopodas kontentigi la turismajn bezonojn.

Unuavice vortoj kunligitaj kun veturado (fervoja, aŭtomobila, aera, mara, eĉ kosma !): centoj da tiaj terminoj helpas ne nur la komencanton, sed eĉ la lingve spertulon (ekz. aŭtoklinkfermilo, trapasa antaŭeco, aŭtoservejo, subtrakpasejo, reltrapasejo samnivela, fervoja konekso, transita hotelo, piedstartilo sur motorbiciklo, magneta sparkilo, ktp.).

Riĉa estas la vortaro en esprimoj de aĉetado (unu el la ĉefaj instigantoj por vojaĝi), vestaro, hotela kaj gasta industrioj, sed eble plej riĉa rilate la gastronomion kaj la sporton; du apartajn fakvortarojn plenigus tiuj vortoj kaj esprimoj. Prave, ĉar manĝi ĉiu kutimas eĉ dum vojaĝo, kaj ja oni devas nepre pensi pri la sportistoj kaj sportamantoj vojaĝantaj.

Ĉu diskuti pri tio, ke naciaj kaj internaciaj manĝaĵ-specialaĵoj meritas apartan E-an nomon, aŭ nur fonetike transskribi la nacian esprimon, aŭ per 4—5 vortoj nur klarigi el kio konsistas la manĝaĵo? Zamenhof montris la vojon, kiam li esperantigis la rusan specialaĵon, la acidetan betosupon je *barĉo*, kvankam tiun supon ekkonis nur vojaĝantoj en Ruslando. Ankaŭ la gastronomia fakvortaro aperinta en la jarlibro de UEA uzis tiun vojon: multaj kuiraĵoj konservis la nacian vorton esperantigita. Videble Pechan kaj Kalocsay rigardis tiajn vortojn fakaj terminoj, kaj kuraĝe aplikas, ekz. pogaĉo (hung. *pogácsa*, itale *focaccia*), aŭ flekeno (la germana *Flecken*, france *le flecken*). (Noto: en Supl. ni vidas *lebenĉo*, sed en la vortara parto ne.)

La vortaristoj pensas pri la dumvoje malsaniĝantoj, pri doganejoj, limtrapaso, distro, koncerto, teatro . . . ni nun rimarkas, kiom multaj esprimoj ĉiutagaj mankas el la kutima vortostoko de diverslingvaj bazaj E-vortaroj !

Ni mencias ankoraŭ, ke inter la du partoj de la vortaro troviĝas suplemento, kiu krom tripaĝa gramatika ekstrakto, enhavas kolektaĵon de geografiaj nomoj sisteme aranĝitaj, kaj kiel specialaĵon tre utilan kaj propagandefikan: tabelan liston de landoj, kie Esperanto estas reprezentata ĉu per UEA-delegitoj, ĉu per landa E-organizaĵo, — kun adresoj. En tiu parto estas ankaŭ listo kaj klarigo de novaj vortoj, neologismoj, el inter kiuj pluraj ne troviĝas ankoraŭ en aliaj vortaroj.

Certe troviĝos, kiuj volus diskuti pri tio, ĉu necesas la enkonduko de neologismoj, kiel ekz. pureo, parfeo, brioŝo, halfo, opcio, . . .sed ja tiuj estas vortoj konataj en preskaŭ ĉiuj lingvoj similforme, kiel ankaŭ la *mo*toristho*telo: motelo*, — kaj ankaŭ *brioŝo* (en formo: *Brioche)* troviĝas ĉie en la mondo sur menukartoj.

Por servi al fremduloj vizitantaj Hungarion estus konsilinde konigi la ĉefajn fonetikajn, prononcajn sciindaĵojn de hungara lingvo (duopaj konsonantoj, longaj-mallongaj vokaloj, ktp.).

Preserarojn ni apenaŭ trovis, tamen inter la numeraloj enŝoviĝis sub „miliardo" la kompostista analogio: „biliardo" anstataŭ la ĝusta „biliono".

Papero, bindo, preso, formo eleganta, bona, gratulon al la eldonejo ! — kaj por la bone solvita malfacila tasko sur tereno, en Esperantio ankoraŭ laŭ nia scio tute ne plugita, sur tereno de turisma vortaro, — gratulon al la aŭtoro kaj lektoro.

D-ro F. Jáki

LEĜO PRI LA NOVA HUNGARA TRAFIK-POLITIKO



Parolas d-ro György Csanádi

En la mondkonata belega konstruaĵo de la Budapeŝta Parlamento la parlamentanoj pritraktis kaj akceptis antaŭ nelonge leĝoprojekton pri temoj, kiuj vekis grandan intereson.

D-ro inĝ. György *Csanádi* akademiano, kaj ministro de trafiko kaj poŝto prezentis novan trafikpolitikan koncepton kaj fervojan leĝo-projekton prilaboritan de multaj diversaj trafikaj fakuloj sur novaj sciencaj bazoj.

Ĝi estas la dua plano tiaspeca en la historio de Hungario. La unuan prezentis István *Széchenyi* (Stefano Seĉenji) nomata „la plej granda hungaro" kiu estis ekonomiisto, inĝeniero, talenta organizanto, projektanto, trafika fakulo, oficiro ktp. Farante vojaĝojn en multaj Eŭropaj landoj, li studis la kaŭzojn, manierojn kaj la ilojn de la ekonomia kaj intelekta evoluado. Li dediĉis sian vivon por la bono de la patrujo kaj de la homaro. Li okupiĝis speciale pri la evoluo kaj evoluigo de la interkomunikado kaj li estis tiu, kiu iniciatis la konstruadon de la unua ĉenponto de Eŭropo inter niaj tiamaj urboj Buda kaj Pest. Inter aliaj li iniciatis la reguligon de la fluejoj Tibisko kaj Danubo, la ŝipveturadon sur nia lago Balatono ktp. Li planis la landvojojn kaj konstruotajn fervojojn tiel, ke Hungario kunligu Orient-Eŭropon kun Okcident-Eŭropo. Lian projekton kaj leĝoproponon li prezentis al la Parlamento en nia tiama ĉefurbo Pozsony (nun Bratislava) en la jaro 1848. La projekton donantan por longa tempo direkton al la trafiko, la Parlamento akceptis. La milito por la sendependeco de la lando en 1848—49 kaj la posta Habsburga subpremo malhelpis lin realigi la grandiozajn planojn, tamen ĝi poste realiĝis kaj la faktoj pravigis lin, ĉar la ŝoseoj kaj la fervoja retaro de la lando estas konstruitaj esence laŭ liaj intencoj.

La nova Balatona ŝoseo



La koncepto de plano *Széchenyi* prenis en unuecan tuton la evoluigon de la fervoja, ŝosea kaj akva trafikoj. Li kalkulis reale kun la tiutempa politika kaj ekonomia situacio de la lando, kaj rekonis kun necesa antaŭvido la signifon de la pasintjarcentaj revoluciaj teknikaj ilaroj.

Memkompreneble la Hungara Parlamento kaj la juraj instancoj dum la pasinta jarcento multfoje okupiĝis pri problemoj de la trafiko. La karakterizajn trajtojn de nia hodiaŭa trafika sistemo difinis esence la trafik-politiko en la mezo de pasinta jarcento. Nun oni devas formi novan trafikpolitikan-koncepton, kiu kontentigas la hodiaŭajn modernajn postulaĵojn, kaj montras por longa tempo la vojon de la evoluo.

Nia lando faris tre multon por la evoluado de la trafiko. Konsiderinde antaŭeniris la fervojrekonstruado, ekz. la longo de la elektrizitaj linioj superas la 560 kilometrojn kaj de Záhony ĝis Hegyeshalom (t. e. de la orienta ĝis okcidenta landlimo) la trafiko okazas sur seninterrompa elektrizita fervoj-reto. Grandiĝis la trakcia kaj la varvagona parko, krome ankaŭ la personvagon-kvanto. La landa ŝosea reto estas modernigata en rapida takto. Rapide kreskis la nombro de aŭtobusoj kaj ŝarĝaŭtoj. La longo de la aŭtobus-vojreto altiĝis super 20 mil kilometrojn ktp.

La trafikpolitika-plankoncepto servas tiun celon, ke per la reala kaj multfaceta analizo de la situacio, la nivelo de nia trafiko signu la ĉefajn direktojn de la longtempa evoluo.

La trafikpolitika koncepto dediĉas apartan ĉapitron al la transdirektigo de la trafiko de la et-trafikaj linioj kaj stacioj, kaj krome por la formado de distrikta staciar-sistemo. Bona solvo de tiu problemo estas unu el la premisoj, ke racionale kaj efike ni povu efektivigi la programon de renovigo de la tuta hungara trafika organizo. Tiu parto de nia konceptado ŝanĝas en maniero plej revolucia la nunan strukturon de la trafiko, influas la trafik-distribuon, kaj efikas je la loĝantaro kaj je la ekonomia vivo de la koncernaj regionoj.

La nuna nivelo de trafiko kvankam respondas al la ĝenerala evoluiteco de popolekonomio, tamen pro la neceso de rapida plenumo de kvantaj pretendoj kaj pro la limigitaj eblecoj de evoluigo, formiĝis neproporciaĵoj en la trafiko. Pro tio la trafiko ne povas konvene eluzi la eblecojn de moderna tekniko, ne povas pli forte kreskigi la produktivecon kaj ekonomiecon.

La baze ne ŝanĝiĝintaj fervoja kaj landvoja retoj — ĉefe la fervojaj flankaj linioj kaj la landvojoj, konstruitaj precipe por ĉaroj trenataj de bestoj — nune jam malhelpas la pluan evoluon de la trafiko pro tio, ke intertempe aliiĝis la karaktero de la person- kaj vartrafiko, la konsisto de la trafikiloj kaj la funkcia teknologio de trafiko.

La trafikpolitika koncepto, priatentanta la ekonomiajn kaj sociajn pretendojn de la lando, difinas tiujn evoludirektojn, kiuj ebligas la ekonomian trafikan labordistribuon, konvenan al la specifecoj de la lando, — la racionaligon de la trafika ordo, kaj konvenas al la atendebla ekonomia, socia evoluiteco de nia patrujo. Ĝi tuŝas ĉiujn trafikajn branĉojn surbaze de la unueca aspektado de la komunikado. La trafikpolitika koncepto resumas la principojn de ekonomipolitiko de la komunikado. La teknikajn ekonomiajn dispoziciojn, necesajn por la realigo antaŭvidas la longtempaj kaj meztempaj planoj de la trafiko laŭ la eblecoj de la popolekonomio en la aktuala tempo-etapo. Per ĝia realigo nia popolekonomio disponos pri tia trafika organizaĵo, en kiu la fervoja kaj ŝosea trafiko formos unuecan, eksklzivan sistemon. La aliaj branĉoj de komunikado plenumos taskojn plej konvenajn al iliaj specialaĵoj kaj al interesoj de popolekonomio.

La proponoj, kiuj jam fariĝis leĝoj malfermas kaj por la nova hungara trafikpolitiko, kaj por la fervojo novan evoluan etapon en la historio de la hungara landa trafiko.

D-ro István Bácskai

FIAT 124

FIAT 124 aĉetebla ĉie en la mondo, tre populara pro siaj komforto, kvalito kaj rendimento, — ĝi donas la plej grandan kompensaĵon kompare uzeblon kaj prezon kun tiuj de aliaj aŭtomobiloj sur la merkato. Cilindrokapacito 1197 cm³, — rapidum-ŝanĝilo je 4 rapidumoj kaj liberringaj sinkroniziloj, — diskaj bremsoj kun korektilo — kaj la sensacia rapido: pli ol 140 km/h !

FIAT 125

FIAT 125 estas unu el la plej alte taksataj fabrikaĵoj en la mondo pro sia evoluita motortekniko, stirado sekura, rendimento kaj komforto maksimumaj. Karakterizaj indikoj: cilindrokapacito 1608 cm³, maksimuma rapido 160 km/h, diska bremsosistemo, vasta kaj hela interno.

LÁSZLÓ BENJÁMIN

Kiuj ne vivas en ravo de modo, bruo kaj brila frazado, sed male, observas ĉiam la esencan, asertas firme, ke ne ekzistas nun pli grava hungara poeto — krom Gyula ILLYÉS — ol László BENJÁMIN. Lian gravecon eĉ levas pluraj admirindaj poemoj el la lastaj jaroj — rajte meteblaj al la plej belaj perloj de la tuta hungara poezio.

Benjámin, poeto meditema, verkas zorge, tre konscie. Naskiĝinta en 1915, post gimnaziaj jaroj li estis jen triklaboristo, jen presisto, ferlaboristo, peltisto, fabrikoficisto. Post 1945 li laboris por longa vico da gazetoj tra la tuta lando, estis dufoje redaktoro de la literatura revuo ÚJ HANG (Nova Voĉo). La talenta mentoro de pluraj junaj poetoj jam de dek jaroj deĵoras kiel bibliotekisto ĉe granda hungara biblioteko.

Lia tuta verkaĵo, ampleksanta apenaŭ pli ol duonmil poemojn, aperis — kune kun liaj tradukaĵoj — en dek volumoj.

DU JARDEKOJ

Hieraŭ, kun mansakoj plenplenaj, trajnveture
vi iris, niajn kozojn aranĝas ĝis nun kure . . .
En dom' vi metas ordon, per mon' manovri provas,
noktmezo vin maldorma, tagiĝ' sur plandoj trovas,
tagluktoj bagatelaj atendas vin sen ĉeso:
morozo oficista, vendista malkomplezo,
kudromašino, trogo, fajrejo, plu . . . grandkvante.
Mallerte vi elektis, vidu, min elektante,
anim-aventurulon, pelatan en mediton
eternan, malstabilan kaj maltrankvilan idon
de praular' trivnerva, poeton sen prefero
al korplabor-muelejo, ofic', negoc-afero,
kiu, ajnloke li 'stas, nenie estas tute,
sub ŝarĝo de mondplagoj nur tristas mornkondute.
Mi vidis: iam, dum vi pli facilpaŝe iris,
pli dance, multajn korojn, okulojn al vi tiris
la belaj kruroj, ĉarma vizaĝ', elasto mama,
pli bravaj vin petadis pri via jeso ama,
vi tamen min aliĝis — por kia taghoraro:
laboro: dekok horoj, kaj zorgo: dudekkvaro.
Fridsanga inter plagoj, surplanda, ĉiam gvata,
vi sciis inter mavoj gaji sub masko glata,
vi estis, se necesis, ŝajnige al mi vera,
kun belkonsolaj vortoj, brakumo varmtenera.
Virinaj brakoj, gamboj, vi, kroĉoferme ŝirmaj,
viron, kiel barelon ringegoj, teni firmaj,
Vi, mola kaj hardita, plektiĝis sur min arde,
alfleksiĝinte, kontraŭ disfal' min tenis garde.
Por kio vi min gardas per via amo nutra:
por viv' da nobla vino aŭ da pluvakvo putra,
pri tio vi ne pensis fidante ĝis ekstremo.
Se mi dekone fidi povus pri mia memo!
Pord-aloj pezaj de du jardekoj frape post ni
fermiĝis; kion povos plu via kor' elporti?
Dorse al juno kion allogan vi esperas?
Doloras vin artikoj, surkrure vejnoj ŝvelas,
edzo kaj kvar infanoj, en ĉirkaŭbar' arestaj,
ni voras vian vivon per dentoj rabobestaj.
Ribelus vi! Ne neu, ke havas vi motivon,
ja ĝuste mia feblo tiranas vian vivon,
tamen, vi estis, por ke mi estu; sen ribeloj
vi donis tiel simple kiel la lumon steloj,
kaj mi akceptis ĉion, memkompreneblan donon,
mi virorgojlon basan mensogis mild' kaj nomon
mi al ĝi donis: Sorto, Vokiĝo, Poezio!
La tuton mi forĵetus, mi kurus for de ĉio:
sukceso, bru', turmento, por kun vi en kabano
kaŝiĝi ie fore, vivi per cep' kaj pano,
se vi trankvilon trovi ne povus krom per tio,
zefiron somerfinan inter ard' kaj glacio.
Mi kurus, vin forportus, kaj tamen, se ne, ĉerpu
do helpon por mi tiel, ke vi jam vin mem helpu!
Ne trinkis mi ĝisfunde el vivmalbonoj veksaj,
fiaskoj venos, vundoj, Canossa-j ostofleksaj,
diablo scias, kio. Sed ĉu nun fuĝu mi? Ne!
Mi ion komencis june, ni vidu, kio fine?!
Ĉu l'sort' min frue tombos aŭ puŝos al avanco?
Magneto por mi estas eĉ miso kaj malŝanco.
Medite, kulpkonscie mi pensas ĉion jenon,
dum mia kor' barakta signalas vian venon.
La posttagmez' jam tardas, sur trajnon vi rapidas,
nervoze de hastado, ĝeme sur benk' eksidas,
ordigas harojn, jupon glatigas vi senĉifa,
vian palruĝan lipon farbas je ark' pli viva.
Nun, fine sidi! Ploro infana ne alarmas!
Pri vi mem vi okupiĝus — sed side vi ekdormas.

(1955)

El la hungara: K. Kalocsay

Budapeŝtaj Muzikaj Semajnoj 1968

De dek jaroj ĉiun aŭtunon la Budapeŝtaj Muzikaj Semajnoj estas aranĝataj. Dum ses semajnoj la plej altnivelaj kaj konataj enlandaj kaj eksterlandaj muzikistoj kaj ensembloj rolas en la ĉefurbo de Hungario; multaj signifaj novaj muzikverkoj estas prezentataj.

Dek jaroj ne estas longa tempo. Tamen ni povas konstati, ke la Budapeŝtaj Muzikaj Semajnoj jam fariĝis tradicio en la kultura vivo de Hungario.

La celo de la Budapeŝtaj Muzikaj Semajnoj estas komenci la aŭtunan muzikan sezonon de Budapeŝto. Ĉi tiuj semajnoj apartenas al la Budapeŝtaj Artaj Semajnoj, iniciatitaj antaŭ tri jaroj.

Ĉi-jare la komencon faris solena koncerto kun reprezentaj verkoj de mondfamaj hungaraj komponistoj (Erkel, Bartók, Kodály) sub la gvidado de *János Ferencsik*.

La Budapeŝtaj Muzikaj Semajnoj pruvis denove, ke multaj mondfamaj muzikistoj devenas el Hungario. Unu el la pruvoj estis la koncertoj de *Antal Doráti*, disĉiplo de Leo Weiner, Bartók kaj Kodály. Li montris sian vivantan kontakton kun sia estinta majstro, Kodály, per la prezentado de lia verko „Psalmus hungaricus" en hungara lingvo. Nur tre malofte ni aŭdis en Budapeŝto tiel klare kaj kompreneble eĉ la plej mallaŭtajn voĉojn de la ĥoro aŭskultante ĉi tiun verkon. Post la Psalmo sekvis la IX-a simfonio de Beethoven, ankaŭ en la originala (germana) lingvo — imitinda ekzemplo.

Ne estas eble aparte mencii ĉiun koncerton, muzikan vesperon de la Muzikaj Semajnoj. Por tiuj, kiuj ne ĉeestis la muzikajn prezentadojn, kelkaj ĝeneralaj rimarkoj certe estos interesaj.

Ĉiujare dum la Muzikaj Semajnoj novaj muzikverkoj estas prezentataj. Inter ili mi mencias la verkojn „Pezzo sinfonico" de *Attila Bozay* kaj „Sinfonia lirica" de *Tibor Sárai*. Tre signifa evento estis la unua prezentado de nova hungara opero: Hamlet de *Sándor Szokolay*. Estus inde pli profunde pritrakti la diversajn flankojn de ĉi tiu verko. Sed ĝenerala raporto pri la muzika vivo ne permesas ĉi tion; eble en la estonto ni donos pli detalajn rimarkojn pri ĉi tiu grava verko.

Estas inde diri kelkajn vortojn pri la nuntempaj hungaraj muzikverkoj kaj pri ilia publiko en Budapeŝto. Bonan eblon por ĉi tio donas la fakto, ke antaŭ nelonga tempo sub la gvido de *András Mihály*, kiu estas mem komponisto kaj profesoro de la Muzika Altlernejo „Ferenc Liszt", de Budapeŝto, fondiĝis nova kamermuzika ensemblo, kiu donis tutan vesperon da verkoj de vivantaj hungaraj komponistoj. *La prezentitaj verkoj apartenis plejparte al la plej novaj muzikaj direktoj, uzis nekutimajn artajn rimedojn*. La fakto, ke la koncertejo estis plenplena, ne pruvas, ke ĉiu aŭskultanto akceptis ĉiun verkon bela kaj bona; sed *la evidenta intereso por la modernaj muzikverkoj montras la altan nivelon de la muzikaŭskultantoj de Budapeŝto*.

La pianisto *Lóránt Szücs* donis tutan pianovesperon dediĉatan al vivantaj hungaraj komponistoj. Ankaŭ ĉi tio estas imitinda ekzemplo ne nur por aliaj hungaraj pianistoj, sed eĉ por eksterlandaj. Tian koncerton povas doni kompreneble nur artisto, kiu vere majstras sian arton. Lóránt Szücs estas tia pianisto, kaj meritas laŭdon pro sia oferemo por la nuntempa muzikkulturo.

Dum la Muzikaj Semajnoj kelkaj eksterlandaj orkestrogvidantoj prezentis sin. *Pierre Dervaux* (Francio), *Genadij Roĵdestvenski* kaj *Maksim Ŝostakoviĉ* (Sovetunio) faris per sia arto la koncertserion de Budapeŝto pli enhavoriĉa kaj bela. Apartan interesan koncerton donis la *Kamera Orkestro de Praha* (sen gvidanto), kiu prezentis verkojn de J. S. Bach, J. Chr. Bach kaj A. Dvorák. (La solovoĉon de ĉembalo-koncerto ludis la jam mondfama *Zuzana Ruziĉková)*.

La lastan koncerton de la Muzikaj Semajnoj donis la mondfama pianisto *Géza Anda*, disĉiplo de Dohnányi kaj Mengelberg. Li ludis pianokoncertojn de Mozart kaj Beethoven kaj gvidis la Hungaran Koncertorkestron prezentante simfonion de Mozart. Ĉi tiu koncerto estis certe la plej bela vespero de la Muzikaj Semajnoj.

Tiamaniere la Budapeŝtaj Muzikaj Semajnoj havis, simile al vera muzikverko, bonan enkondukon kaj belan finalon. Sed — kiel veraj muzikverkoj — eĉ disonancoj ne mankis el ili en ĉi tiu jaro. En la lasta minuto la Simfoniistoj de Bamberg, la „Collegium musicum" de Zürich kaj la Opero de Bologna rezignis. Laŭ mia scio ĉi tio ne okazis laŭ intenco de la muzikistoj, sed kiel sekvo de la politika sinteno de la respektivaj landaj registaroj, kiuj minacis ilin repreni la ŝtatan subtenon, se ili vizitas landon, kies politikaj paŝoj ne estas aprobataj de la registaro.

Oni diras, ke ni, socialistoj, faras ĉiun paŝon laŭ politikaj interesoj. La menciita fakto estas bona rifuto kontraŭ tiu ĉi antaŭjuĝo. Neniam okazis, ke muzikistoj, artistoj aŭ sciencistoj de socialisma lando ne vizitis tiun aŭ alian landon, ĉar ties politiko ne plaĉis al ili. Ni scias, ke per nia kultura laboro ni servas la pacon kaj la amikecon de la nacioj. Ĉi tiun agadon ni daŭrigos en tiu ĉi senco en la estonto. Landaj registaroj, kiuj perforte trudas politikajn vidpunktojn en la kulturan vivon, malfaciligas la atingon de ĉi tiu humanista celo. Estas evidente, kies percepto estas la ĝusta kaj servas la intereson de la homaro.

Lajos LESZNAI

LA PETOLEMA TELEFONO

Longe kaj akre sonoris la telefono. Maria kolerege turniĝis en la lito kaj ŝi surtiris al si la rozkoloran plumkovrilon. Sur la nokta ŝranko la blanka bakelita aparato insiste sonoris plu. La dormo forflugis, Maria forprenis la aŭdilon:

— Alo ... — ŝi ekparolis.

— Mi kisas vin ... mia dolĉega koro ... — aŭdiĝis la voĉo el la transa flanko de la drato.

— Kion vi diris? !

— Kiel vi fartas, mia kara Irena ... ĉu vi bone dormis?

— Bone ... tre bone ...

Maria divenis pri tio, ke estas erara interligo, sed la virina scivolemo vekiĝis en ŝi kaj plaĉis al ŝi la malico.

— Ĉu vi amas min? — demandis la viro.

— Jes ...

— Rediru!

— Mi amas vin ...

— Je la sesa mi atendos vin en la sukeraĵejo „Rozo" ... estu akurata!

— Bone ...

— Mi kisas vin!

Klakadis la telefono, iĝis silento, nur la mallaŭta zumado de la elektra fluo estis aŭdebla en la dratoj. La knabino trankvile ekridis, kiam ŝi pensis pri tio, ke la nekonata viro hodiaŭ vespere vane atendos sian karulinon.

Maria ne enlitiĝis reen, antaŭ la spegulo ŝi longe kombis siajn blondajn harojn kaj intertempe ŝi ankoraŭ pensis pri la aŭrora telefonparolado. Sur la aŭtobuso ŝi rigardis kun esploraj okuloj la virojn kaj ŝi pere de la matene aŭdita voĉo provis imagi la staturon de la telefonanto.

Ŝi klopodis pensi pri alia afero, sed anstataŭ tio ŝi ofte aŭskultis la voĉon de la parolantoj kaj ŝi serĉis la similecon al la voĉo de la telefonanto.

En la planfara oficejo de la fabriko sur la oblikva desegnotabulo ofte haltis en la mano de Maria la liniilo kaj kvazaŭ sur la desegna karto, malantaŭ la regulaj linioj ŝi estus vidinta fantazian virkapon.

Ĉe la najbara desegnotabulo tintege falis sur la plankon okulvitroj, ĝi ne rompiĝis, sed tiel staris sur la planko, kvazaŭ ĝi rigardus iun. La knabino abrupte pensis pri tio, ke la telefonanto certe portas okulvitrojn.

Maria vespere longe ne povis ekdormi kaj dumnokte maltrankvile turniĝis en la lito. En la sonĝbildo viroj portantaj okulvitrojn vokis ŝin per telefono kaj ili petis de ŝi rendevuojn.

Frumatene akre sonoris la telefono:

— Ĉu vi estas ĉi tie mia dolĉulino?

— Jes ...

— Kial vi ne venis hieraŭ vespere al la sukeraĵejo?

— Mi havis urĝan laboron ...

— Kial vi ne telefonis al mi?

Maria konfuziĝis, ŝi ne povis respondi, abrupte ŝi havis aŭdacan penson:

— ... Kiajn okulvitrojn vi portas nun?

Momente estiĝis silento, Maria sentis, ke la viro surpriziĝis. Malrapide venis la respondo:

— ... La kadrita ... kiu plaĉas al vi ... sed kial ...

Klakado estis aŭdebla, la telefono dismetis la interligon. La knabino longe atendis la novan sonorigon, sed la aparato restis muta.

*

— ... Alo ...

— Ĉi tie estas Irena ... mi kisas vin ...

— Kial vi demetis la aŭdilon?

— Kian aŭdilon? ! ... efektive nur nun mi vokis vin ... ekde tri tagoj vi silentas!

— Mi silentas? ... eble mi ne kun vi paroladis pri tio, ke hieraŭ vespere mi renkontiĝas kun vi en la sukeraĵejo? ... Antaŭ kelkaj minutoj vi diris, ke pro urĝa laboro vi ne povis veni ... — diris la viro kolere.

— Vi tute ne parolis kun mi, ekde tri tagoj ...

— Lasu la farson ... parolu serioze!

— Mi serioze parolas ...

— Ĉu mi estas frenezulo? — demandis la viro.

— Eble ... mia kara ... — respondis Irena.

La telefono klakadis kaj la aparato iĝis muta. La viro vokis la numeron de Irena kaj la stranga maŝino faris kontakton kun la numero de Maria. La aparato longe sonoris, sed vane, ĉar Maria intertempe forlasis la domon.

*

Kiam Maria transpasis la pordegon de la fabriko, ĉe la pordista budo policisto staris kaj kontrolis la dokumentojn de la alvenantoj. La policisto severe trarigardis la legimitilon de Maria kaj diris:

— Bonvolu iri rekte al la kontoro de la direkcio!

— Kial? !

— Mi scias nenion ... bonvolu obei! — montris la vojon la policisto.

Maria diris nenion kaj ekiris al tiu direkto. Kiam ŝi iris, la pordisto longe rigardis post ŝi kaj diris al policisto:

— Kia damaĝo ... ŝi estas bela fraŭlino kaj ŝi estas tiom lama ...

En la atendejo de direkcio jam estis multe da homoj. Iu nekonata viro demandis de ŝi:

— Mi petas vian nomon!

Maria respondis kaj la viro rigardis nomliston, poste diris:

— Bonvolu sidiĝi kaj atendi ...

Maria ĉirkaŭrigardis, en la okuloj de la kolegoj vibris la ekscito. Ŝi rimarkis, ke la ĉeestantoj estas inĝenieroj kaj teknikaj desegnistoj, kiuj laboras kun ŝi en la planfara oficejo. Verŝajne la parolado inter ili estis malpermesata, ĉar ĉiuj sidis senvorte. Post kelkaj minutoj viro venis el la direkcia kontoro kaj oni vokis alian personon por eniri, ambaŭ estis la kolegoj de Maria. Malrapide pasis la tempo, nur burdo zumis konstante ĉirkaŭflugante la lustron. Fine oni vokis ŝin.

Ĉe la verda drapohava longa tablo sidis policoficiroj kaj civilaj viroj. Ĉe alia tableto estis tajpistino.

Kiam Maria eniris, momente ĉiuj okuloj rigardis ŝin.

La direktoro de la fabriko sidis ĉe la fino de longa tablo. Dika policoficiro demandis ŝin:

— Fraŭlino, kion vi scias pri la plandesegno, kies numero estas 16,954?

— Nenion ... sen notlibro mi ne povas respondi al vi ...

— Tiu notlibro estas la via? — montris la oficiro.

Maria transprenis la libron kaj ŝi tuj ekvidis, ke la numero de la desegno estas ĉirkaŭrondita per ruĝa inko. Maria respondis:

— Jes ... mi jam rememoras ... tiun desegnon ni devis manipuli, kiel intiman dosieron ...

— Kion vi faris al la desegno?

— Kiam la desegno estis preta, mi en bona ordo transdonis ĝin al sinjoro ĉefinĝeniero ... bonvolu rigardi la subskribon ... — montris Maria la notlibron al policoficiro.

— La subskribo estas falsa ... vi

ne transdonis la desegnon, kien vi metis ĝin?

— Mi faris nenion al ĝi ... mi transdonis proprapersone! — defendis sin Maria.

— Ĉu vi scias ... kiel gravega estas tiu desegno?

— Por mi ĉiu desegno estas grava!

— Kie estas nun la grava plandesegno?

— Mi tute ne scias ... mi vere transdonis!

La policoficiro vokigis la ĉefinĝenieron.

— Ĉu tiu subskribo estas la via?

— Eble ...

La alta sekstatura viro estis pala, kiel la muro.

— Jes ... aŭ ne ... diru difinite! — kriis la dika policisto.

La pala viro fiksrigardis al Maria, kiu kuraĝe rerigardis. Fine hezitante li diris:

— Jes ...

— Kion vi faris al la desegno?

— Mi enŝlosis ĝin en la ŝtalŝrankon de sinjoro direktoro ...

— Kun kiu?

— Kun la direktoro ...

La policoficiro rigardis al la direktoro, kiu sidante ĉe la fino de la longa tablo ofte purigis la okulvitrojn. La dika policisto iom pensadis kaj diris al Maria:

— Hodiaŭ vi ne labors. Iru tuj hejmen kaj restu en via loĝejo, ĝis kiam mi donos permeson al vi!

Maria ekstaris kaj komencis iri. La dika oficiro interdiris:

— Pardonu fraŭlino, vi ne iros sola, akompanos vin al via hejmo du detektivoj!

*

La du detektivoj renversis ĉion en la loĝejo de Maria. La domtraserĉo estis senrezulta. Fine ili petis pardonon kaj sidiĝis en fotelojn. En tiu momento Maria komencis ploregi. Ĉe la malgranda ronda tablo Maria surigis sian kapon sur la manojn kaj ŝia sultro skuiĝis pro la ploro. Iu detektivo interdiris:

— Estu trankvile ... kara fraŭlino ... se vi estas senkulpa ... okazos nenio ... ni havas devon por fari tiun aferon, laŭ la ordono ... Maria iom trankviliĝis kaj poste iris al la kuirejo por fari nigran kafon. Dumtempe la alia sekreta policano, kiu portis kadritajn okulvitrojn, elprenis malgrandan aŭdilon kaj faris kontakton kun la konektilo de telefonaparato.

Horoj pasis post horoj, okazis nenio. Fine akre sonoris la telefono. La okulvitra detektivo mansignis al Maria, ke ŝi levu la aŭdilon, ankaŭ li levis la sian.

— Ĉu vi estas Irena?

— Jes ...

— Do, mia kara aŭskultu kaj notu ... tuj enkofrigu la necesan vestaĵon ... vojaĝu per la tria-hora vagonaro al vilaĝo Kutas ... antaŭ la hotelo Park staros griza aŭtomobilo, kies numero estas Ja. 34—37 ... en ĝi mi sidos kaj ĉe mi estos ĉiu pasporto ... kè ni povu feliĉe somerumi kaj danci kun vi ... ĉu la amletero estas ĉe vi?

— Jes ...

— Certe kunportu!

— Bone ... mi estos tie ... — respondis mallaŭte Maria.

Abrupte klakadis la telefono kaj la aparato iĝis muta.

Post dek minutoj tre granda nigra privata aŭtomobilo kuregis sur la landvojo al la direkto de vilaĝo Kutas. Maria sidis inter la du detektivoj kaj jam ridetis kiam la okulvitra viro diris al ŝi:

— Estu trankvila, kara fraŭlino ... ni renversis vian ĉambron ... sed ni promesas al vi, se vi volas, ke kiam ni finos la aferon ... certe ni helpos al vi por fari ordon en via ĉambro ...

*

En la aŭtomata telefoncentro dum la kontrola laboro iu instrumentisto diris al la alia:

— Rigardu kolego ... ĉi tie la turniĝanta ŝaltila martelo estas tute kurbiĝinta kaj ofte kontaktas kun alia telefonlinio ... estas interese, ke iu el ambaŭ telefonnumeroj ne informis nin pri la malbona funkciado..

— Jes ... jes ... la homoj estas tre nezorgemaj ... aŭ dum la misfunkciado ili tute ne uzis la aparatojn ...

Szilárd BÁLINT



DUM VIA VIZITO EN HUNGARIO

la benzinstacioj de ÁFOR estas kompleze je via dispono

ÁFOR BENZIN-OLAJ

Korespondi deziras

51-jara kontoristo kor. kun e-istinoj pri beletro, arto, naturo kaj pri ĉiuj temoj de la homo. Int. BK kaj fotojn. Jan *Vedevik*, Poste Rest., Huvudpostkontoret, GÖTEBORG 1, Svedio.

Jossif *Prynczynicz*, SZCZECZIN, ul. Kagiellonska, N. 71. m. 10. Pollando, int. PM, monerojn kaj sondiskojn.

Wallace *Ferguson*, GRENISLAND, 57 Knocksallagh Park. Nord-Irlando, kor. pri fotografado, kol. sondiskojn kaj sonbendojn.

Kor. komenca grupo! Rejanozo kulturdomo, PETOZIJCE, ul. Starogradska 12, distr. Myslibor 2, prov. Szczecin, Pollando.

18—30-jaraj membroj de Pola E-Junulara Klubo „Esperantujo", KATOWICE-GISZOWIEC, Poŝtkesto 2, Str. Pszczynska 10.

29-jara oficistino, Eszter *Szabó*, Petőfi strato 32, SZEGHALOM, Hungario, kor. kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.

Por fondi internacian etomologo-asocion, krome akiri pli da interŝanĝeblecoj, skribu al S. E. *Mollema*, Jacob Marisstraat 57, LEEWARDEN, Nederlando: aŭ al Paŭlo *Fabulya*, Lövőház u. 32. II. 2. BUDAPEST II.

LETERKESTO

British Esperantist, London. Ĝoje ni legis en via multmerita gazeto la sekvan informon: „Hungara Vivo. Kvaronjara. Bone redaktita revuo. Ne tro nacieca aŭ tendenca. Ofte enhavas kontribuaĵojn verkitajn de membroj de la Budapeŝta Skolo' Kalocsay, Tárkony k. a. Jarabono 13 ŝ." — Ĉio ĝusta kaj dankinda, nur la esprimo „nacieca" estas iom miskomprenebla. Multegaj artikoloj kaj informoj de H. V. pruvas, ke ni ne volas meti nian landon kaj popolon super aliajn landojn kaj popolojn, la sincera deziro por la prospero kaj feliĉo de ĉiu popolo vigle vivas en la animo de ĉiuj bonaj hungaroj.

Inĝ. Leo G. Fišbein, Uzlovaja, Sovetunio. Nun ni refoje kaj korege salutas vin, kara Amiko, kiu partoprenis en la liberigo de Hungario. Ni vidis en la urba ĵurnalo „Standardo" (sendita de vi), foto-komponaĵon, ankaŭ la titolon de Hungara Vivo. — Ankaŭ ni mem partoprenis en via ĝojo, ke post dek-jara korespondado vi persone konatiĝis kun via hungara amiko Ferenc Hervai el Dorog, kaj kun lia edzino. Post kelkhora promenado en Moskvo, en la sekva tago li kun vi vizitis la novan karbominejon ĉe Uzlovaja. Ĉie — en la karbotrusto, lernokombinumo kaj karbominejo — oni akceptis samideanon Ferenc Hervai kiel „plej bonan fraton". Ankaŭ ni dankas vin kaj la sovetajn ministojn pro la amika akcepto.

G. Waringhien, Franca Esperantisto. Ni legis vian recenzon pri la „Gvidlibro por Supera Ekzameno II." — Aparte ni dankas al vi, ke vi reĝustigis kelkajn strangaĵojn aŭ erarojn en la unuaj ĉapitroj. Pri la dua parto vi konstatas, ke „tiu parto estas la sola ĝis nun ekzistanta literaturhistorio de nia lingvo; ĝi klare montras la tri periodojn de nia ĝisnuna literaturo, provas difini ties karakterojn, kaj donas la liston de la aŭtoroj originalaj kun mallonga, sed preciza biografio kaj bibliografio".

Emilija Lapenna, Zagreb. Ni ne tro ŝatas la personojn, kiuj tage-nokte kapjesas, laŭdegas eĉ la komojn en la manuskriptoj. Jam antaŭ pli ol cent jaroj la fama hungara kritikisto, József Bajza emfazis: „Kritikon ni bezonas, vere la kritikon!" Pro tio mi salutas la artikolon de Emilija Lapenna en Norda Prismo pri nia Gvidlibro II, ĉar ŝi funde analizas, komparas, ekzamenas kaj — kontraŭdiras. Jes, tio estas la tasko de la recenzisto ankaŭ en Esperanto. Sed nun ankaŭ mi kontraŭdiras al E. Lapenna. Ekz. la manko de ilustraĵoj kaj de poemoj aŭ prozaĵoj dependis ne de la redaktoro aŭ verkistoj, sed de la nesufiĉa kapitalo. Ĉe la fino ankaŭ nia kolegino diras, ke la aperigo de la Gvidlibro estas „tre pozitiva fakto", kaj ni mem aldonas: ĉe la kunmeto de la dua eldono oni devas lerni el ĉiuj eĉ etaj rimarkoj.

Esperantisto Slovaka, Martin. Ni represigas kelkajn liniojn de via artikoleto: „Ni ne estas ia sekto, apartiĝinta de la vivo, socio kaj nacio, sed antaŭ ĉio ni estas anoj de la slovaka kaj ĉeha nacioj kaj servas al niaj socialisma patrujo kaj socio. Tial ni firme subtenas niajn gvidantojn ŝtatajn kaj politikajn . . . Ni volas helpi ilin en la plenumo de iliaj gravaj kaj malfacilaj taskoj, kaj ni petas, ke oni tion ebligu per permeso fondi memstaran (libervolan) Esperanto-Federacion, per allaso en la fremdlingvajn disaŭdigojn kaj per apogo kaj sekurigo de nia preso." — Ni tute konsentas kun vi, karaj geamikoj. Mi — kiel historiisto de Esperanto — bone rememoras, ke antaŭ dudek jaroj Ĉeĥoslovakio estis la plej forta bazo de Esperanto en la tuta mondo. Ni hungaroj estus feliĉaj, se vi baldaŭ atingus, kaj poste superus la nivelon de la Esperanto-movado en Hungario.

L. K.

HUNGARA VIVO

Aperas jare 4 × 4 000 ekzempleroj
spegulmezuro: 172 × 240 mm 3 kolumnoj 54 mm

Oficiala revuo de la hungara Esperanto-movado. Ĝi enhavas beletristikon, novelojn, poemojn, ktp. — artikolojn pri problemoj de la hungara Esperanto-movado kaj skribaĵojn prezentantajn la vivon de Hungara Popolrespubliko kaj de la hungara popolo.

1/1 paĝo $ 120,— DM. 480,—

HUNGEXPO-PRESTO (advertising agent) Budapest 70 POB. 44



LA HUNGARA UZINO DE OPTIKAĴOJ

Budapest 114. Pf. 52. Telex: 259.

Produkta sortimento:

Geodeziaj instrumentoj
Laboratoriaj instrumentoj
Vitrofadenaj medicinaj instrumentoj
Periferiaj unuoj de komputeroj
Okulvitro-lensoj
Okulvitro-garnajoj
Fluid-mezuriloj
Vekhorloĝoj
Optikaj iloj
kaj aparatoj
Diversaj
mezuriloj
kaj kontroliloj

Malnovan mankon forigas kaj la postulaĵojn de la moderna elektrotekniko kontentigas



Finommechanikai

és

Elektronikus Műszergyártó KTSZ

Budapest XI., Karinthy Frigyes u. 22.

(Etindustria Produkta Kooperativo de Precizmekanikaj kaj Elektronikaj Instrumentoj)
kiu prilaboris kaj fabrikas en konstante abundiĝanta sortimento la instrumento-familion
TRANSISTORA KONTINUTENSIA STABILIZITA NUTROUNITO

La nutrounitoj pretiĝas en plaĉa, moderna ekstera formo, kun dimensioj eksteraj laŭ la internacie akceptita sistemo 19″ RACK — uzeblaj por konstru-unitoj en la sekvaj tensio-intervaloj:

1. tipo TR—9255 0— 6 V 2. tipo TR—9252 0— 15 V 3. tipo TR—9253 0— 30 V
4. tipo TR—9254 0— 60 V 5. tipo TR—9160 0—120 V 6. tipo TR—9161 0—200 V nun evoluigata 7. tipo TR—9162 2× 40 V noo evoluigata

Uzoterenoj:

Ĝi estas ne malhavebla helpinstrumento sur vasta teritorio de elektroniko, sed ĉefe en la konstante evoluanta transistora tekniko.

Por funkciigo de transistoraj cirkvitoj ĝi estas uzebla kiel regulebla nutrofonto kun malalta tensio kaj malgranda interna rezistanco.

Ĝi estas speciale konforma por nutro kaj daŭra funkciigo de transistoraj funkciaj unitoj, laboratoriaj unitoj sen nutrotensio, mezurpontoj, ktp.

Krome ĝi estas konforma por anstataŭigo de akumulatoroj. Ĝi estas nemalhavebla instalaĵo por laboratorioj, uzinaj aparat-mezurigaj sekcioj kaj servostacioj.

Funkcia principo:

La aparato transformas la cirkvit-retan alternan kurenton kontinua kurento. Ĝi plenumas duopan taskon:

1. Ĝi samniveligas la fluktuadojn de cirkvit-reta tensio, kaj tiel la fluktuadojn de la produktita kontinua kurento malpliiĝas je minimumo.

2. Sendepende de la ŝarĝado ĝi stabiligas la eliran tension.

Oni povas ĝustigi la eliran tension per dekada divido. La eliran kurenton mezuras ampermetro kun dividprecizo 1.5. La aparato estas ŝirmata kontraŭ kurta cirkvito kaj supermezura kurentintenso.

Teknikaj indikoj;

T Tipo	TR 9255	TR 9252	TR 9253	TR 9254	TR 9160	TR 9161	TR 9162
Tensiointervalo	0— 6 V	0—15 V	0—30 V	0—60 V	0—120 V	0—200 V	2×40 V
Intensointervalo	0—10 A	0— 5 A	0—25 A	0— 1 A	0— 1 A	0—0,5 A	0—1 0—2 A
Interna rezistanco pli malgranda ol	20 mOmo	40 mOmo	40 mOmo	60 mOmo	50 mOmo	100 mOmo	30 mOmo
Ĉe ±10%-a ŝancelo de reta tensio la elira tensio-ŝanĝo estas pli malgranda ol	±0,05%	±0,05%	±0,02%	±0,01%	±0,01%	±0,01%	±0,01%
Stabileco estas pli bona ol	1 : 200	1 : 200	1 : 500	1 : 1000	1 : 1000	1 : 1000	1 : 1000
Bruo- kaj zumtensio estas pli malgranda ol	2 mV	1 mV	1 mV	0,5 mV	0,5 mV	1 mV	1 mV



Fortikaĵo de Gyula

KRESKANTA NOMBRO PLIIĜANTAJ ARANĜAĴOJ

Kun la ĝojige kreskanta nombro de la esperantistaro en Hungario memkompreneble kreskas ankaŭ la pretendo partopreni dum la somera ferio renkontiĝojn, perfektigajn kursojn, komenci la praktikadon de la lernitaĵoj. La plej malnova estas el la aranĝaĵoj en nia lando la Somera Esperanto Universitato en la urbo Gyula, en sudorienta parto de Hungario. La amika atmosfero de la ĉarma, trankvila urbeto, la ĉie spertebla bonvolo de la lokaj instancoj, kreas vere favoran medion por la internaciaj renkontiĝoj kaj akcelas la lingvan perfektiĝon de la partoprenantoj. Ne nur en la prelegejoj eksonas dum ĉi tiuj semajnoj la Internacia Lingvo, sed ankaŭ en la pitoreska Fortikaĵteatro kaj en la basenoj de la agrabla banejo, situanta sub freŝiga ombro de praparko en la centro de la urbo.

De la 6-a ĝis la 12-a de julio en 1969 jam la sepan fojon atendas studemajn esperantistojn la Somera Esperanto

Lago Balatono



Szeged

Universitato, kiu dum jaroj iĝis internacia forumo de la esperantlingva sciencpopularigo. Jam aperis la informiloj kun ĉiuj sciindaĵoj kaj kun la allogaj temoj de la ĉi-someraj prelegoj. Ili estas mendeblaj je la adreso: Somera Esperanto-Universitato, GYULA, 48-as u. 11. Hungario.

Cele de la pliperfektigo de la Esperanto-scio oni estigis antaŭ kvin jaroj la Internacian Pedagogian Seminarion en Szeged — en urbo de la sunbrilo. Esperantistoj el kiom da nacioj babiladis jam per la helpo de la komuna lingvo ĉe la romantika bordo de Tisza, aŭ preparis sin ekscitite por la diversgradaj ekzamenoj. La diplomoj de la internacie rekonataj ekzamenoj de la Pedagogia Seminario de Szeged havas konsiderindan reputacion antaŭ esperantistoj de la tuta mondo.

La 6-a Pedagogia Seminario okazos ankaŭ en 1969 en la — jam tradicia — periodo inter la 10-a kaj la 20-a de aŭgusto en komforta studenta hejmo; tre konvena por serioze studemaj partoprenantoj. Organizanto de la Pedagogia Seminario estas: Csongrád-departementa Komitato de Hungara Esperanto Asocio, SZEGED, pf. 227.

En 1968 estis aranĝita la I-a Internacia Esperanto-Tendumado por infanoj en la pitoreska montar-regiono Mecsek en la pionirtendaro de departemento Baranya. La bonsukcesan aranĝaĵon, kie la partopreno estis speciala premio por la hungaraj infanoj, kiuj bone sukcesis en la lernado de Esperanto, ankaŭ en la nuna jaro, en julio intencas organizi la Baranya-departementa Komitato de HEA. Pli detalajn informojn vi trovos en la sekva numero de Hungara Vivo. Al tiu ĉi sukcesa Esperanto-renkontiĝo de la infanoj ĉi-jare aliĝas ankaŭ la gejunuloj de nia lando. La Hungara Esperanto-Junularo ĉi-somere ja intencas organizi sian unuan internacian tendumadon ĉe alloga punkto de la hungara maro Balaton, verŝajne en la tre agrabla ripozloko Balatonszemes.

É. Farkas

NIA HUMURO

Raporto kaj glaso da biero

Antaŭ kelkaj jaroj ĉefo de unu el niaj trafikaj entreprenoj devis fari ampleksan raporton pri ia entreprena afero. Malŝate li skribis la raporton, ĉar li opiniis, ke neniu supera instanco finlegos kaj studos ĝin funde. Sed por fari provon, post du trionoj de sia raporto li faris la jenan noton inter krampoj: „Kiu ĝis ĉi tie legis mian raporton, tiu ricevos de mi glason da biero."

— Eble oni eĉ ne rimarkos tiun ĉi noton — li diris al kolego, — aŭ se oni rimarkos ĝin, tiam mi ricevos riproĉon.

Nu, la raporto iris al la unua oficeja ĉefo. Tie nur supraĵe oni rigardis ĝin kaj kun novaj notoj oni sendis plu al la supera instanco. Ankaŭ tie en unu-du fakoj oni legis la materialon. Oni aldonis novajn notojn kun novaj dokumentoj kaj la tutan materialon oni sendis al la ministerio.

La forsendinto de la dokumento jam vidis, ke li pravis, ĉar neniu supera instanco faris rimarkon pri la materialo. Sed iun tagon lia telefono eksonoris kaj oni informis lin, ke oni ligos lin kun la ministro, kiu cetere estis esperantisto.

— Tie ĉi parolas István Kossa! — aŭdiĝis de la alia fino de la drato. — Mi sonorigis al vi, nur por ke mi diru, ke mi pretendas ricevi la promesitan glason da biero!

Hungara haremo de mahometano

Okazis ankoraŭ en 1962, ke en Bagdado oni aranĝis solenaĵon je la 1200-jara datreveno de la fondiĝo de l'urbo kaj je la memoro de l'unua araba filozofo Al Kindi. Tiun ĉi solenaĵon partoprenis ankaŭ d-ro Gyula Germanus, nia eminenta orientalista scienculo, kiun antaŭ nelonge oni elektis ano de la akademio de Irako.

Sed lia vojaĝo al Bagdado havis interesan premison. Nome, kiam li ricevis la invitilon de d-ro Naĵil, la prezidanto de l'akademio en Bagdado — kompreneble, ke li ĝojis. Sed profesoro Germanus, tiam jam 78-jara, opiniis, ke en tia aĝo li jam ne povos vojaĝi sola. Tial li skribis humurtonan leteron al la prezidanto de l'akademio en Bagdado:

„Ĉar mi estas mahometana haĝio, mi havas tre malgrandan haremon — mi havas entute nur unu edzinon —, eble por vi tio ne estus granda elspezo, se vi invitus ankaŭ mian haremon.

Babela humuro

Multaj scias, ke Avery Brundage, la prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato, depost kiam li havas tiun oficon, ĉiujn olimpikojn li malfermas en la lingvo de la aranĝanta lando. En Meksiko li parolis hispane. Ĵurnalisto, kiu faris raporton pri la solena malfermo, skribis: mi ne komprenas la lingvon kaj mi turnis min al mia „indiĝena" amiko, por ke li interpretu.

La meksikano levis siajn okulojn al la ĉielo:

— Sinjoro, mi naskiĝis en Meksiko, mia patra lingvo estas la hispana, sed eĉ unu vorton mi ne komprenas el lia parolo.

* * *

Elektronika tradukmaŝino, kiu faris tradukon el la franca lingvo en la anglan, ricevis tekston, en kiu troviĝis la jena frazo: „La spiritaj fortoj estas grandegaj, sed la korpo estas malforta." La maŝino iom vulgare faris la sekvan tradukon: „La alkoholaj trinkaĵoj estas fortaj, sed la viando estas putra."

* * *

Ĉefo dungas novan oficiston kaj demandas lin:

— Ĉu vi parolas Esperanton? Kun unu-du el niaj klientoj ni korespondas en Esperanto.

La nova dungoto strečas sian bruston.

— Jes, mi parolas ĝin! Mi ja vivis tie dek jarojn!

Skribis, kolektis:

Imre Szenes
Trad. L. Kökény

El la 2-a numero de Hungara Vivo

Karaj legantoj, vi povos legi en nia sekva numero: Sándor Szathmári: Tria preĝo de Pygmalion (originala Esperanta prozo), „Gasta-paĝo": Hilda Dresen, Sándor Somogyi Tóth: Koni (novelo), György Moldova: La turnebla soldato (novelo), Lajos Lesznai: Nova hungara opero — Hamlet, István Bácskai: La konstruiĝanta Budapeŝta metro, Kolomano Kalocsay: Domfabriko, Vali Szabó: Panoramo, Ferenc Jáki: Kiel mi malkovris la finnan-hungaran lingvoparencecon inter la mankantaj kornoj de la bovino?, István Szerdahelyi: Esperanto-instruado: Metodo kaj metodoj, Nuntempa hungara poezio. La plej, eminenta hungara lingvisto: d.ro Géza Bárczi — esperantisto, Aurel Ponori Thewrewk: La plirapidiĝanta tempo, La grafikarto de 1919, L. Kökény: Leterkesto, Nia humuro, Recenzoj kaj tiel plu.

Atendas vin Balatono

Ĉi-jare la unuan fojon vi povas ripozi en vera esperantista atmosfero apud Balatono, ĉar de H. E. J. estos aranĝita *la I-a Internacia Balatona Esperanto-Ferio*

30. junio—13. julio 1969

en Balatonszemes, kampadejo „Lido". La banloko estas unu el la plej agarblaj ĉe la suda bordo de Balatono. Ĉiu partoprenonto povas libere elekti laŭ sia gusto el tri kategorioj.

Limdato: 15. majo 1969. Ĉiujn demadojn ni respondos detale. ORGANIZA KOMITATO de I.B.E.F. Klara Varga, prezidanto, Jozefo Deák, sekretario. Nia adreso: Hungara Esperanta Junularo, Kenyérmező u. 6. Budapest VIII., Hungario.

Alvoko

Hungara Esperanto-Asocio organizos Internacian Esperanto-Ekspozicion de Infandesegnoj, *de la 24-a de majo ĝis la 15-a de junio 1969 en BUDAPEŜTO.* La ekspozicion povas partopreni ĉiu infano, kiu lernas Esperanton, ĝis 14-jara aĝo, el la tuta mondo. *La temo de la ekspozicio: LA LUDO.* La desegnon oni devas alsendi sur 30×40 cm-a desegnopapero, krome la Esperante skribitan anonciĝon de la konkursanto. Ni petas ĉiun konkursanton, *bonvolu afranki la koverton per maloftaj, belaj poŝtmarkoj. La koverton kaj la leteron ni ekspozicios samtempe kun la desegno. La plej bonaj desegnoj estos distingitaj per altnivelaj premioj.* La infanoj *alsendu la desegnojn ĝis la 1-a de majo 1969,* al la adreso de Johano INGUSZ, lerneja direktoro, XIII., Tomori u. 2. BUDAPEŜTO, Hungario.

Ne Omsk, sed Tomsk! *En la 4-a n-ro de HV. sur p. 10a enŝoviĝis preseraro. Anstataŭ la urbonomo Omsk devas esti:* Tomsk, *situanta ankaŭ en Siberio, 200 km-jn de Omsk.*

GLOSARO:

unito = estas proponita termino en la dua signifo de „unuo" en PV: difinita kvanto elektita por taksi per komparo samspecajn kvantojn, ekz. kilogramo estas unito de pezo, — metro estas unito de longo. (Uzata en Nova Vortaro Esperanto-Japano, rekomendata de Fichholz en Duden-Bildvortaro.)

SE REKLAMO, ĉion per



MAGYAR HIRDETŐ

Hungara Anoncoficejo

Budapeŝto, V.

Felszabadulás tér 1.

Telefono: 183—640

Poŝta adreso: Budapest 5.

Poŝtkesto 367

Planado – organizado

efektivigo de

REKLAMKAMPANJO

Modernaj reklamiloj

Abono de HUNGARA VIVO en eksterlando

Peranto al eksterlando: KULTURA Budapest, 62, P. O. Box 149. — Sumoj de abonprezo por unu jaro, en pluraj ĉefaj valutoj: Usonaj dolaroj = 1,50; Kanadaj dolaroj = 1,50; sterlingaj funtoj = 0—11—0; okc. germanaj markoj = 6,40; svedaj kronoj = 7,80; norvegaj kronoj = 10,70; danaj kronoj = 10,40; italaj liroj = 940,—; belgaj frankoj = 75,—; svisaj frankoj = 6,60; francaj frankoj = 7,50; nederlandaj guldenoj = 5,50.

Perantaj firmoj en la diversaj landoj:

ANGLUJO
Colle's Holdings Ltd., Denington Estate, London Road, WELLINGBOROUGH
The Danubia Book Co., 78 Shaftesbury Avenue, LONDON W. 1.

AŬSTRIO
Globus (VAZ), Höchstädtplatz 3, A—1200, WIEN I.
Rudolf Novák Gmbh., Köllnerhofgasse 4, A—1011, WIEN I.

AŬSTRALIO
Cosmos Bookshop, 133 Ackland Street, St. Kilda, Vic. A. Keesing, 168—174 Day Street, SYDNEY, N. S. W. 2000

BELGUJO
Agence Messagerie de la Presse, Rue du Persil 14—22, BRUXELLES

BULGARIO
„HEMUS", Pl. Slawejkov 11, SOFIA

ĈEĤOSLOVAKIO
P. N. S. — dovoz tisku, Vinohradska 46, PRAHA 2.
P. N. S. — dovoz tisku, Leningradska 14, BRATISLAVA

DANLANDO
Ejnar Munksgaard, Prags Boulevard 47, COPENHAGEN/S.
Hunnia Books, Norrebrogade 182. I., COPENHAGEN/N.

SUD-AMERIKO
Livraria Brody Ltda., Caixa Postal 6366, SAO PAULO, Brazilo
Livraria D. Landy, Rua 7 de Abril, Caixa Postal 7943, SAO PAULO, Brazilo.
Luis Tarcsay, Calle Iglesia Ed. Villoria Apt. 21—105, C. 24. CARACAS, Venezuela

FINNLANDO
Akateeminen, Kirjakauppa, Keskuskatu 2, HELSINKI

FRANCUJO
Agence Littéraire et Artistique Parisienne, 7 Rue Debelleyme, PARIS 3
Société Balaton 12 Rue de la Grande Bateliére, PARIS 9.

NEDERLANDO
Swets et Zeitlinger, Keizersgracht 487, AMSTERDAM C.

ISRAELO
Hadash, R. Nesz Ciona 4, TEL-AVIV
Lepac Ltd., 15 Rambam, TEL-AVIV
Gondos Sándor, Herzl 16, Bét Hakranot, HAIFA
A. Fischer, R. Strauss 3, JERUSALEM

JAPANUJO
Nauka Ltd., 30—19, Minami-Ikebakukuro 2-chome, Toshima-ku, TOKYO

JUGOSLAVIO
Forum, Vojvode Misica broj 1, NOVI-SAD
Jugoslovenska Knjiga, Terazije 27. BEOGRAD

KANADO
Délibáb Film and Record Studio, 19 Prince Street West, MONTREAL 18. Que.
Pannonia Books, 2 Spadina Road, TORONTO 4, Ont.

ĈINUJO
Watwen Shudian, P. O. B. Nr. 88. PEKING

POLLANDO
P. K. W. Z. Ruch. ul. Wronia 23, WARSZAWA

GERMANA DEMOKRATA RESPUBLIKO
Zeitungsvertriebsamt, Fruchtstrasse 3—4, 1004, BERLIN

GERMANA FEDERACIA RESPUBLIKO
Griff Verlag, Über der Klause 7, 8 MÜNCHEN 90
Kubon und Sagner, Schliessfach 68, 8 MÜNCHEN 34.
Kunst und Wissen, Postfach 46, Wilhelmstrasse 4, 7 STUTTGART 1.
W. E. Saarbach, Follerstrasse 2, 5 KÖLN 1.

NORVEGIO
A/S Narvesens Litteratur Tjeneste P. O. Box 6140 Etterstad, OSLO

ITALIO
Avv. Andrei Lazar, Via Monte delle Gioie 24, ROMA
S. Co. Lib. Ri., Piazza 33, ROMA

RUMANIO
OSEP, Gara de Nord, BUCURESTI
OSEP, ORADEA

SVISUJO
AZED AG., Dornacherstrasse 60/62, BASEL 4200
Metropolitan Verlag, Binningerstrasse 55, ALLSCHWILLL

SVEDUJO
A. B. Nordiska Bokhandeln, Drottninggatan 7—9, STOCKHOLM 1.
A. B. Sandbergs Bokhandeln, Sturegatan 8, STOCKHOLM 5.

SOVETUNIO
Sojuzpechatj. Import, Prospekt Mira 112-a MOSKVA

USA (Usono)
Center of Hungarian Litterature Inc., 1538 Second Ave., NEW YORK 10028
Corvin Travel and Gift Parcel Service, 1590 Second Ave., NEW YORK 10028
Stechert-Hafner Inc. 31. East 10th St., NEW YORK 10003
Magyar Áruház Könyv- és Lemezosztálya, 11802 Buckeye Road, CLEVELAND

VJETNAMO
Phong Phat Hanh Bao Chi 17. Dinh Le. HANOI

KOREO
„Chul Bo" PHENJAN

Hungaroj abonu por eksterlandanoj laŭ la avizo sur la 1-a paĝo

medimpex

Hungara Eksterakomerca Entrepreno por Farmakologiaj Produktaĵoj Budapest, 5. Poŝtkesto 126
Eksportas . Importas
Farmakologiaj specialaĵoj . Farmakologiaj bazmaterialoj . vakcinaĵoj por hom- kaj best-terapeŭtikaj celoj . veterinaraj drogoj . furaĝkompletigaĵoj . laboratoriaj kemiaĵoj . biokemiaj produktaĵoj . radioaktivaj produktaĵoj . volatilaj oleoj . kuracplantoj . resanigaj kaj amaraj akvoj

EXPORTS-IMPORTS

Pharmaceutical Specialites • Pharmaceutical

90-jara estas

LA UZINO DE ELEKTRAJ APARATOJ GANZ

La produktaĵojn de tiu mondfama fabriko al 60 landoj eksportas

La Hungara Eksterland-komerca Entrepreno de Elektraj Aparatoj

TRANSELEKTRO

Budapest V., Münnich F. u. 13. POB. 377.

Telefono: 120—790